

Kongreslibro

大会案内書

대회안내서

La 2-a Komuna Esperanto-Kongreso de Japanio kaj Koreio

第2回日韓共同開催エスぺラント大会

第105回日本エスぺラント大会

제 50 차 한국에스페란토대회

Nara

Japanio

2018-10-12~14



Diverseco kaj komuneco
de kulturoj — en Esperanto

エスぺラントで語る
文化の多様性と共通性

에스페란토로 말하는
문화의 다양성과 공통성

Ĝuu 58 programerojn entute!

Nomo:

Numero:

Kongresanoj kalkuliĝas 514. (2018-10-10)



La 2-a Komuna Esperanto-Kongreso de Japanio kaj Koreio

La 105-a Japana Esperanto-Kongreso
La 50-a Korea Kongreso de Esperanto

2018

Enhavo

- 6 Organizantoj kaj Aŭspiciantoj
- 7 Salutoj kaj mesaĝoj
- 7 Prezidanto de JEI
- 8 Prezidanto de KEA
- 9 Prezidanto de KLEG kaj LKK
- 10 Prezidanto de UEA
- 11 Prezidanto de KAEM
- 12 Guberniestro de Nara
- 13 Urbestro de Nara
- 14 Invititoj
- 15 LKK, helpanto, TeKo
- 16 Premioj
- 16 Premio Ossaka
- 16 Literatura Konkurso
- 16 La 18-a Hajpin-Premio
- 17 La 15-a Premio de LEE Chong-Yeong
- 17 Premiado al la Elstaraj Kontribuintoj al la Korea Esperanto-Movado
- 18 Esperanto en Japanio
- 21 Historio de Korea Esperanto-Movado
- 23 Memorlibro
- 24 Programo
- 27 Laŭhora listo de programeroj
- 29 Klarigoj de Kongrestemaj Programeroj (K01 - K20)
- 36 Klarigoj de Fakkunsidoj (F01 - F30)
- 40 Salono 1, Salono 2
- 42 Tagmanĝo, Bankedo, Frumatena Promenado
- 43 Kiel kunvivi kun blinduloj/vid-handikapitoj
- 44 Por Bona Rilato kun Cervoj
- 45 La Espero, La Tagiĝo
- 47 Kiel legi nomon japanan kaj korean
- 49 Longedaŭraj membroj de JEI
- 50 Omaĝe al forpasintoj
- 51 Listoj de kongesanoj
- 57 Mapoj de ĉambroj, kunsidejoj

Organizantoj

Japana Esperanto-Instituto
Korea Esperanto-Asocio
Kansaja Ligo de Esperanto-Grupoj

Aŭspiciantoj

Korea Kultura Centro de Osaka
Japana Nacia Komisiono por UNESKO
La Japana Internacia Fonduso
Nacia Federacio de UNESKO-Asocioj en Japanio
La Japana PEN-Klubo
La Gubernio Nara
La Urbo Nara
La Ligo de UNESKO-Asocioj en Nara
La UNESKO-Societo de Nara
La Ĵurnalo Nara
La Ĵurnalo Yomiuri (Filio de Nara sub la Ĉefoficejo en Osaka)
La Ĵurnalo Asahi (Filio de Nara sub la Ĉefoficejo en Osaka)
La Ĵurnalo Mainichi (Filio de Nara)
La Televid-stacio Nara
Brodkastejo Nara dot FM 78.4MHz

主催

一般財団法人 日本エスペラント協会
社団法人 韓国エスペラント協会
一般社団法人 関西エスペラント連盟

後援

駐大阪大韓民国総領事館韓国文化院
日本ユネスコ国内委員会
(独法) 国際交流基金
(公社) 日本ユネスコ協会連盟
(一社) 日本ペンクラブ
奈良県
奈良市
奈良ユネスコ連絡協議会
奈良ユネスコ協会
奈良新聞社
(株)読売新聞大阪本社奈良支局
朝日新聞大阪本社奈良支局
毎日新聞奈良支局
奈良テレビ放送(株)

なすとFM[®] 78.4MHz

Saluto de JEI



SUZUKI Keiichiro,
Prezidanto de Japana Esperanto-Instituto
KN: J033

Karaj kongresanoj kaj gastoj,

Mi salutas vin ĉiujn ĉe la 2-a Komuna Esperanto-Kongreso de Japanio kaj Koreio, nome de Japana Esperanto-Instituto. Mi elkore dankas vin pro via partopreno en ĉi tiu kongreso el Koreio kaj Japanio kaj aliaj lokoj en la mondo.

La 1-a Komuna Esperanto-Kongreso de Japanio kaj Koreio okazis en Seongnam de Koreio en 2011 kun granda sukceso. Post la kongreso oni diris, ke se eble ni havu la 2-an Komunan Kongreson post 5 jaroj. Do en 2015 kiam mi kaj Profesoro LEE Young-koo, Prezidanto de Korea Esperanto-Asocio, renkontiĝis ĉe la Strategia Forumo de UEA pri Orientazia Movado en Hangzhou de Ĉinio, komenciĝis interkonsiliĝo pri okazigo de la 2-a Komuna Kongreso. Kaj fine, Korea Esperanto-Asocio kaj Japana Esperanto-Instituto konsentis, ke aŭtune en 2018, ili okazigu la 2-an Komunan Kongreson en Nara, japana malnova ĉefurbo, 7 jarojn post la 1-a Komuna Kongreso. Ĉi tiu kongreso enhavas la 105-an Japanan Esperanto-Kongreson kaj la 50-an Korean Kongreson de Esperanto, kun multaj komunaj programeroj.

La kongresa temo estas “Diverseco kaj komuneco de kulturoj – en Esperanto”. Kulturo estas ĉiam grava temo por ni. Ĉi-jara kongresa temo de la UK estis “Kulturoj, lingvoj, tutmondiĝo: kien nun?”, kiu ankaŭ inkluzivis la vorton “kulturo”. Kulturoj de Koreio kaj Japanio havas multajn komunajn punktojn, ekzemple pri lingvo, kaj samtempe ĉiun unikecon kaj multe da diverseco. Ĉi tie en Nara, al kiu en antikva tempo alta kulturo estis alportita de koreoj, ni interŝanĝu opiniojn kaj diskutu pri kulturoj utiligante nian lingvon Esperanton. Tiel ni profundigu nian amikecon, kaj plu antaŭenigu la interkompreniĝon unu la alian. Tio certe ligiĝos al disvolvado de Esperanto kaj rezulte al paco.

Dum tiu ĉi kongreso, mi deziras, ke vi ĉiuj havu valoran kaj ĝojan tempon. Ni sukcesigu ĉi-kongreson kunlaborante!

Saluto de KEA



LEE Young-koo,
Prezidanto de Korea Esperanto-Asocio
KN: K006

Estimataj sinjorinoj kaj sinjoroj,

Estas klare videble, ke granda ĝojo regas la kulturcentron de Nara. Ni ĝojas des pli, ke nia kongreso stariĝas en la loko klasika kaj longhistoria, en kiu nin ĉirkaŭas belaj naturoj kaj mondaj heredaĵoj de Japanio.

Al mi persone, ĉifoja vizito al Nara revokas en mi la memoron de la 17a Friska Lernejo, kiun mi partoprenis antaŭ 33 jaroj en la jaro 1985. Kaj en la hodiaŭa tago ni la esperantistoj Japanaj kaj Koreaj starigas la komunan kongreson, akordigante siajn landajn kongresojn, la 105a Japana kaj la 50a Korea kongreso de Esperanto, kune levante la kongresan temon 'Diverseco kaj Komuneco de Kulturoj'.

Ni memoras bone la unuan komunan kongreson de la jaro 2011, kun la temo "Esperanta amikeco kaj interkompreniĝo trans la maro", per kiu ni metis la konkretan ponton trans la maro, tra kiu venis en Koreion niaj estimataj japanaj amikoj, kaj nun post 7 jaroj ni Koreaj amikoj transiras la ponton kun kora amikeca saluto.

Korea Esperanto-Asocio, kiu ĝis nun okazigis sian landan kongreson nur ensialande, nun celebras sian 50jaran jubileon en najbara lando kun sia plej proksima amiko. Tiu ĉi kongreso faros al ni brilan substrekon en la historio de Korea Esperanto-movado. Kaj mi estas konvinkita, ke tia ĉi kongreso, la komuna, kiel la nia, kondukas la azian Esperanto-movadon kaj akcelas tion en diversaj landoj.

Starantaj ĉi tie, ni ĉiuj estas homoj amantaj kaj pacon kaj Esperanton. Ni, esperantistoj komprenas tre bone, ke atingi pacon ne estas eble, se ne estas tie egaleco. Sur la tero sin trovas diversaj gentoj kun siaj propraj kulturoj kaj malsamaj religioj. En tia cirkonstanco mi gravuras en mian koron la vorton de Konfuceo, la granda filozofo de Ĉinio, t.e., Sincera amikado. La sola vojo, per kiu ni ĉiuj povos fari simbiozon sur unu sola terglobo, estas lerni kiel harmoniigi sin al siaj najbaroj spite malsamajn trajtojn. Ni, esperantistoj, komprenas tion kaj ni faru nian laboron komisiitan al la pacaj batalantoj.

Al estimataj gesinjoroj de Japana Esperanto-Instituto, Kansaja Ligo de Esperanto-Grupoj kaj Prepara Komitato, kiuj neniom avaris en la preparo de la nuna kongreso, nia afero ŝuldas multan dankon.

Ankaŭ al ĉiuj, kiuj sopiris multe, tamen ne povis trovi la eblon korpe partopreni, kaj tial havas pli grandan preĝon en sia koro, mi deziras sanon kaj konsolon, kaj kuraĝon kaj dankon.

Pli forte flirtu la idealo de Esperanto, pere de nia komuna kongreso. Ni klopodos, ke la 3a komuna kongreso estiĝu en pli proksima tago, kiam ni Koreaj amikoj invitos vin ĉiujn denove.

Dankon.

Saluto de KLEG kaj LKK



KIMOTO Yasuhiro
Prezidanto de KLEG kaj LKK
KN: J019

Karaj kongresanoj, kiel la prezidanto de Kansaja Ligo de Esperanto-Grupo(KLEG), kaj samtempe la prezidanto de la Loka Kongresa Komitato(LKK), mi bonvenigas vin al la 2-a Komuna Kongreso de Japanio kaj Koreio, kaj esprimas mian sinceran dankon al via solidara partopreno. Precipe Nara-anoj kaj Kansaj-anoj tre ĝojas bonvenigi vin en sia regiono Nara.

Antaŭ pli ol monato, en la 4-a de septembro, terura tajfuno atakis nian regionon, kaj damaĝis nian ordinaran vivon. Duono de la Internacia Flughaveno de Kansajo subakviĝis, kaj la ponto por trafiko estis difektita per kolizio de petrolŝipo al ĝi. Tiam preskaŭ ĉiuj aviadiloj ne povis ekflugi nek surlandiĝi, pro malfunkcio de la instalaĵoj. Malgraŭ tia malfacilo kaj kun multe da zorgo, vi kuraĝe alvenis la kongreson de ekster Japanio, pro kio mi refoje multege dankesprimas.

Vi jam bone komprenas la gravan signifon, ke tiu ĉi kongreso estas la 105-a Japania Esperanto-Kongreso, kaj samtempe la 50-a Korea Kongreso de Esperanto.

En antikva epoko japano kaj koreo kune aktivis en la historio, en Nara. Budhismo venis en Japanion tra Koreio, kaj enradikiĝis en nia socio dum longe. Ĉio devenas de Nara, kie vi nun kunsidas.

Naskiĝis la ideo okazigi la duan komunan kongreson en Nara, kiam interparolis japanaj kaj koreaj esperantistoj en la 103-a Japania Kongreso en la urbo Oumihaĉiman. Sed tiam mi hezitis akcepti la proponon, kvankam mi estis la prezidanto de la Nara-Esperanto-Societo, pro malmultaj membroj de la societo. Imagu, ke gubernio Nara estas malpli granda ol la urbo Kioto, parolante pri iliaj loĝantaroj. Tiam, la eksa prezidanto de KLEG, s-ro TAKUMA Kenzi, proponis akcepti la kongreson, en ĝia regula kunsido. Ankaŭ estas decidite, ke ne nur Nara-anoj estos membroj de LKK, sed ankaŭ Kansaj-anoj pli vaste. En Koreio s-ro Ho Song respondecas pri la afero, kiel la ĝenerala sekretario de Korea Esperanto-Asocio(KEA). Li kaj mi jam vizitis kaj trarigardis tiun ĉi lokon, kaj ankaŭ priserĉis la amasloĝejon en Tenri, utiliginte lian viziton al ni.

La situacio ŝanĝiĝis de tiam. Mi estis elektita kiel la prezidanto de KLEG, kaj s-ro TAKEMORI Hirotoŝi nun respondecas pri la Nara-Esperanto-Societo. Refoje ni kune prezentas nian varman bonvenon al ĉiuj kongresanoj.

Do, ĝuu *vian* kongreson, komprenante unu la alian, kaj disvastigu Esperanton!

Saluto de UEA



Mark Fettes
Prezidanto, Universala Esperanto-Asocio

Karaj kongresanoj,

Kun ĝojo mi salutas vin de la alia flanko de Pacifiko. Malgraŭ la vasteco de tiu oceano, mi sentas min proksime al vi, dank' al la mirinda kapablo de Esperanto konstrui pontojn trans diferencojn lingvajn, kulturajn, geografiajn.

Antaŭ kelkaj semajnoj mi partoprenis la komunan kongreson de Kanado kaj Usono, en la pacifika urbo Seatlo, nur tricenton da kilometroj sude de mia loĝloko en Vankuvero. Tiaj komunaj kongresoj fariĝas iuspeca esperantista tradicio, kaj ili havas specialan signifon, kiam ili kunigas landojn kun malfacila komuna historio, kiel Francio kaj Germanio, aŭ la landoj ĉirkaŭ la itala Triesto. La kunvenado de japanaj kaj koreaj esperantistoj estas ĝuste tia okazo. Se ni volas, ke la 21-a jarcento konduku al pli harmonia kaj daŭripova mondo, nepras tiaj agoj de solidareco kaj interkompreniĝo.

La japanaj kongresoj ĉiam liveras altkvalitan programon artan, klerigan kaj movadan. En komuna kongreso, tiu programo estas ankaŭ signo de la disvolviĝo de la orientazia Esperanto-movado, kiu fariĝas ĉiam pli grava fonto de inspiro kaj iniciatemo por la monda Esperanto-komunumo. Mi do esperas, ke viaj kursoj kaj kunvenoj, viaj diskutoj kaj distraĵoj, havos ankaŭ azian kaj eĉ tutmondan dimension. “Pensi monde, agi loke” estis slogano de aktivuloj en mia junaĝo. “Pensi loke, agi monde” estas la kompletiga devizo, same grava por ni. UEA ja bezonas vian membrecon kaj vian kunlaboron!

Jen unu fokuso por tiu kunlaboro. Ĉiujare centmiloj da homoj tra la mondo eklernas Esperanto per la reto. Unu el la ĉefaj streboj de UEA nuntempe estas malfermi nian movadon al ili, por ke ili ne restu nur “retaj lernantoj” sed fariĝu membroj kaj aktivuloj. Kiel atingi tion en Japanio kaj Koreio? Kaj kiel montri la vivantecon de Esperanto en viaj landoj por lernantoj el aliaj mondopartoj, por allogi kaj inspiri ilin? Jen demandoj, kiuj nepre ne manku inter la temoj por via traktado en Nara.

Nome de miaj kolegoj en la Estraro kaj Komitato de UEA, mi deziras al vi kiel eble plej ĝojplenan kaj fruktodonan semajnon.

Saluto de KAEM

Fortan Amikecon kaj Progresan Futuron



So Jinsu
Prezidanto de KAEM
KN: K031

En la nomo de KAEM, Komisiono de Azio kaj Oceanio, mi salutas vin, karajn kongresanojn kaj esperantistojn de Japanio kaj Koreio. Kaj mi esprimas mian simpatian por konkreta amikeco de 2 landoj kaj progressa futuro de tutmonda esperanto-movado per tiu ĉi kunlaboro. 7 jarojn inter 2 komunaj kongresoj ni ne malestis diversajn kaj buntajn renkontiĝojn de tempo al tempo, de loko al loko, de seminario al UK. Kaj ni ofte dediĉis nin por preparo de pli komforta renkontiĝo kaj serĉo de informoj por mi mem kaj alies oportunejoj.

Ni tamen pasigis longan tempon por realigo de la 2a komuna kongreso post la 1a evento de la jaro 2011. KAEM deziras kaj subtenas daŭrigpovan, grandan kaj gvidan komunumon de ambaŭ landoj en orienta azio. La 2a Komuna Kongreso certe estus produkta, kreema, amikeca kaj ankoraŭ juna, kun belaj rezultoj kaj maturaj planoj por estonto.

Ekde 1994 de la fondo de nia komisiono okazis sablaj eventoj en Azio kaj en 2 landoj. Kunlabore kun UEA kaj multaj organizoj de ambaŭ landoj, nia komisiono kreskis kaj kreskas je nuna grandeco kaj nivelo. Nia komisiono nun konsistas el 14 landoj, kaj havas observantojn de rusa REU, kaj 2 tutmondajn organizojn, ILEI kaj TEJO. Almenaŭ nun KAEM kaj azia Movado povas kreski ĉefe per la kontribuoj de japanaj kaj koreaj esperantistoj. Kaj KAEM esperas ke tiu ĉi kongreso nasku multajn ideojn, imagbildojn kaj atingojn por denunaj movadoj kaj organizaj kaj individuaj progresoj en nova epoko.

Okaze de la rapide ŝanĝanta jarcento de socimediaj interretoj, ni esperantistoj estu avangardaj, pioniroj de internacia lingvo kaj tutmonda kulturo, utiligante nian lingvon kaj tviteron, fejsbukon, jutubon kaj instagramon. Kaj ni orientaj esperantistoj kontribuu por la progresso de sudorienta, suda, okcidenta, mezorienta azioj kaj tutmondo.

Mi kaj KAEM deziras al vi plejajn plezuron, prosperon kaj rikolton dum la komuna kongreso, kun specialaj dankoj al preparaj partneroj de Japanio kaj Koreio.

Amike via

Gratulmesaĝo de la Guberniestro de Nara

奈良県知事 荒井 正吾



第2回日韓共同開催エスペラント大会並びに第105回日本エスペラント大会及び第50回韓国エスペラント大会が、奈良県において盛大に開催されますことを心からお慶び申し上げます。

日韓共同開催エスペラント大会は、2011年に第1回大会が韓国城南市で開催されて以来7年ぶりに実施され、日本ではここ奈良県が初めての開催地となります。本大会の開催にあたり、ご尽力いただきました日本エスペラント協会をはじめ韓国エスペラント協会、そして関西エスペラント連盟の皆様に対し、深く敬意を表します。

奈良に都があった時代、日本にとって朝鮮半島は大陸文化を伝える重要な地でありました。仏教をはじめ、当時朝鮮半島を通してもたらされた文化が、奈良には数多く残されています。また、当時の奈良は、シルクロードの終着地として、各国から様々な人や物の集まる国際色の豊かな場所でもありました。

本大会のテーマである「エスペラントで語る文化の多様性と共通性」を語り合う場として、奈良はふさわしい舞台となるのではないかと考えています。

本県では、文化・地域振興施策の一環として、「ムジークフェストなら」事業を実施しています。今年で7回目を迎えた本事業では、世界遺産となる社寺を中心に、県内各地で魅力あるコンサートを開催し、国内外の多種多様な音楽にスポットライトを当ててきました。

また、今後日本では、ラグビーワールドカップ2019、東京オリンピック・パラリンピック2020、そしてワールドマスターズゲームズ2021 関西などの開催が予定されており、世界中から多くの参加者や観光客が訪れます。本県においても、「文化の多様性と共通性」への理解の重要性が高まる中、本大会の開催は大変有意義なものになると期待しています。

結びに、本大会のご盛會と、日本エスペラント協会をはじめ韓国エスペラント協会及び関西エスペラント連盟の今後ますますのご発展とご健勝を祈念し、お祝いのことばといたします。

Mi elkore gratulas la 2-an Komunan Esperanto-Kongreson, kaj samtempe la 105-an Japanan Esperanto-Kongreson kaj la 50-an Korean Kongreson de Esperanto, okazigata en nia gubernio Nara.

La 1-a Komuna Esperanto-Kongreso estis okazigita en Seongnam en Koreio, 2011, kaj 2-foje en Nara post 7 jaroj. Mi profunde esprimas respekton al klopodo de Japana Esperanto-Instituto, Korea Esperanto-Asocio, kaj la Kansaja Ligo de Esperanto-Grupoj.

Kiam Nara estis la ĉefurbo, la korea duoninsulo estis grava loko por Japanio por enkonduki kontinentan kulturon. Multaj kulturaĵoj enportitaj tra la duoninsulo, inkluzive budhismon, restas en Nara. Kaj Nara prosperis kiel la fina loko de Silka Vojo - riĉa loko kun internacieco, kie diversaj homoj kaj aferoj kolektiĝis de diversaj landoj.

Mi kredas, ke Nara estas deca loko de via temo "Diverseco kaj Komuneco de kulturoj - en Esperanto".

Nia gubernio okazigas "Muzikfeston" ĉiujare, en principo por regionrevivigo. En ĉi tiu 7-a jaro, ni okazigas koncertojn pivote de sanktejoj, elektitaj kiel mondaj heredaĵoj, kaj tenas allogon al diversaj muzikoj enlandaj kaj alilandaj.

De nun en Japanio okazos sportaj eventoj kiel Mondpokala Rugbeo 2019, Tokia Olimpiko kaj Paralimpiko 2020, kaj la Monda Aĝula Ludo 2021 en Kansajo. Kompreno al "Diverseco kaj Komuneco de kulturoj" estos pli kaj pli grava, kaj tial mi esperas, ke ĉi tiu kongreso havos signifoplanan frukton.

Ĉe la fino, mi refoje esprimas respekton al la tri organizoj, kaj esperas ilian plian prosperon.

ARAI Shôgo, Guberniestro de Nara

Gratulmesaĝo de la Urbestro de Nara

奈良市長 仲川 げん



第2回日韓共同開催エスペラント大会が、ここ奈良市で盛大に開催されますことをお慶び申し上げますとともに、全国各地をはじめ、海外からお越しいただきます皆さまを心から歓迎申し上げます。

奈良市と韓国の慶州市とは、1970年に姉妹都市提携を締結して以来、約40年間にわたり国際交流の歴史を積み重ねてまいりました。現在では慶州市・トレド市・西安市・ベルサイユ市・キャンベラ市・揚州市の6都市と交流を続けております。

その韓国で、今年2、3月に開催されました平昌オリンピック・パラリンピックでは数々のドラマが起きました。その中でも、スピードスケート500メートルの小平奈緒選手による金メダルが、日本国民を歓喜の渦に包んだことは、記憶にも新しいことかと存じます。そんな中私は、2位に終わったイ選手を抱き寄せる小平選手に感動を覚えました。お互いを称え合う姿は、これぞ真のオリンピック精神であり、記録よりも記憶に残る名シーンだと思います。そして、イ選手に手を差し伸べた小平選手に、同じ日本人としての“誇り”を改めて感じるところであります。

世界平和とは、遠くにあるものではなく、一人の人を大切にすることだと改めて認識いたしました。国際交流に関しても、多様性を認め合い、互いを思いやる「心のバリアフリー」を広げなければなりません。

今大会のテーマは「エスペラントで語る文化の多様性と共通性」であります。どこの国にも属さず、国籍や民族などにとらわれない国際言語であるエスペラントを通して、言語や文化、生活習慣などを認め合うことで国境の壁が取り除かれ、「日本人」と「外国人」が触れ合うのではなく、「人」と「人」との心と心が通い合えることと存じます。平等と友好と世界平和の歩みを進めていくことを目指して、参加者の皆さまが国際的な交流、理解が深められることをご期待申し上げます。

結びになりますが、この大会において、皆さまの日々の活動の成果が発揮されますことを願うとともに、今後ますますのご活躍を祈念いたしまして、お祝いの言葉とさせていただきます。

Mi gratulas, ke la 2-a Komuna Esperanto-Kongreso de Japanio kaj Koreio okazas grandioze en Nara, kaj mi bonvenigas gastojn enlandajn kaj eksterlandajn.

Nia urbo Nara kaj Gyeongju de Koreio ĝemeliĝis en 1970, kaj spertis 40-jaran historion de internacia rilato. Nun ni havas 6 ĝemelajn urbojn, nome Gyeongju, Toledo, Xi'an, Versailles, Canberra, kaj Yangzhou.

En la lasta vintra olimpiko kaj paralimpiko en Pyeongchang, Koreio, okazis nekalkuleblaj dramaj aferoj. Inter ili, la ormedalisto KODAIRA Nao de 500-metra rapidsketado volvis nin en ĝojeksplodo. Dume, mi estis impresita de ŝi, kiu brakumis la ludanton LEE Sanghwa, kiu finis la ludon je la dua loko. Tia figuro, kiu laŭdas unu al alia, montris veran spiriton de olimpiko, kaj prezentis memorindan scenon. Mi sentis fieron de ŝi, kiel unu el japanoj.

Mi rimarkis, ke la mondpaco ekzistas ne malproksime, sed estas en respekto al aliaj. Koncerne internaciajn interŝanĝojn, ni devas akcepti variecon, kaj ankaŭ estimi la aliajn homojn kun "senbara koro".

La temo de ĉi tiu kongreso estas "Diverseco kaj komuneco de kulturoj - en Esperanto". Uzante la internacian lingvon Esperanto, ne apartenante al iu propra lando, nek nacio, nek raso, la muro de landolimoj disfalis en respektado de lingvoj, kulturoj kaj vivkutimoj. Okazos kontakto de "homo" kun "homo", ne de "japano" kun "alilandano". Mi esperas, ke la kongresanoj havos profundan internacian komprenon, por egaleco, amikeco kaj mondpaco.

Fine mi deziras, ke via ĉiutaga klopodo estos bone efektiva kaj havigos al vi riĉan frukton, kun mia gratulmesaĝo al ĉi tiu kongreso.

NAKAGAWA Gen, Urbestro de Nara

Invititoj



Toka
(Dương Tú Kiêu)
Vjetnamio
LKK-ano de la Azia
Kongreso
KN: J373

Bonan tagon!

Mia nomo estas Duong Tu Kieu. Mia esperanta nomo estas Toka. Mi loĝas en urbo Ho Chi Minh, suda Vjetnamio. Mia laboro estas oficistino en privata kompanio.

Mi eklernis la lingvon antaŭ 20 jaroj, kaj mi ne diligente lernis. Sed ĝis nun mi bone agadis kaj estas unu el la aktivuloj en Esperanto-movado en Ho Chi Minh.

Esperanto ŝanĝis mian vivon. Dank' al tio, mi havis multe da bonkoraj geamikoj en la tuta mondo, precize en la azilando. Krom mia laboro en la kompanio ĉiutage mi estas okupita pro esperantaj geamikoj. Esperanta vivo estas vere interesa por mi.



Mondero
(SHIN Hyunkyu)
Koreio
Prezidanto de KEJ
KN: J394

Saluton! Mi estas SHIN Hyunkyu, alinome Mondero en Esperantujo, kiu servas kiel prezidanto de Korea Esperanto-Junularo. Mi loĝas en Seulo kaj tie studas pri la korea lingvistiko en magistra lernejo.

Ĉi tiu jaro estas signifoplena por mi ne nur pro nia komuna kongreso, sed ankaŭ pro tio, ke pasis ekzakte dek jaroj, de kiam mi unuafoje malfermis lernolibron de Esperanto. Mi eniris en universitaton kaj komencis lerni Esperanton samtempe en 2008, do ja mi feliĉe povas sinprezenti, ke mi travivas Esperante dum miaj dudekaj jaroj. Kia honoro!

Mi elkore dankas ĉi-fojan inviton. Kiam mi atingos kongresejon, mi afiŝos foton kun samideanoj sur Instagramon kaj Fejsbukon, dirante al miaj geamikoj, kiuj ne komprenis/as mian amon je Esperanto: "He, mi jam diris! Esperanto ĉi tiel tre tre tre moĝosas!"

Loka Kongresa Komitato (LKK), helpanto

J019	Kimoto Yasuhiro	prezidanto de LKK
J049	Hotta Yuri	estrarano de JEI
J036	Aikawa Setuko	J077 Sasanuma Kazuhiro
J043	Fujii Yumiko	J178 Sassa Yasuhiro
J003	Honda Terumi	J411 Sawai Hideyuki
J048	Hotta Hirohiko	J012 Somekawa Takatosi
J177	Hotta Toshiko	J097 Takemori Hirotoshi
J391	Isogai Naotake	J127 Takemura Teruo
J151	Kitagawa Syozi	J030 Tahira Masako
J050	Machimura Noriyuki	J255 yamasita tosihiro
J175	Matoba Kacuhide	J091 Yokota Yu
J080	Maekaŭa Haruja	J031 Tahira Minoru
J007	Morikawa Kazunori	



Tegmenta Komisiono (TeKo)

J033	Suzuki Keiichiro	K041	IM Hanu
J001	Isikawa Tiekō	K009	KANG Hon-gu
J254	Hirota Masaaki	K027	OH Soonmo
J019	Kimoto Yasuhiro	K002	HO Song
J255	yamasita tosihiro	K021	LEE Junghee
J158	KAŬANIŜI Tecuroŭ	K025	HAN Sugheui
J121	Sibayama Zyun'iti	J394	SHIN Hyunkyu
J014	Syozi Keiko		

Premioj

1 Premio Ossaka



Prelego okazos en
K01C, sabate.

KN: J053, J054

En la jaro 2018 la komisiono de la Premio Ossaka aljuĝis la premion al gesinjoroj HARADA: s-ro HARADA Hideki kaj s-ino HARADA Husako. S-ro HARADA Hideki longtempe estris Okayama-filion de Japana Esperanto-Instituto kaj nun estas prezidanto de Okayama Esperanto-Societo. Li estis la Prezidanto de LKK de la 93-a Japana Esperanto-Kongreso, memore al la centjara jubileo de Esperanto-Movado en Japanio en Okayama en 2006 kun bona sukceso. Plie iutempe li estis Ĉefdelegito de UEA por Japanio. S-ino HARADA Husako longtempe gvidas Esperanto-Klubon de *Sanyo Knabina Lernejo*, sekve la antaŭan gvidantinon, s-inon Suzuki Masumi.

* La Premio Ossaka estis establita en 1938 okaze de la 26-a Kongreso de Japanaj Esperantistoj, honore al s-ro OSSAKA Kenĵi (1888-1969). Li fondis Japanan Esperanto-Instituton en 1919 kaj estas konata kiel Patro de Japana Esperanto-Movado. De 1938 la premio estas donata ĉiujare al esperantisto(j), kiu(j) kontribuis rimarkinde al la movado.

2 Literatura Konkurso

Branĉo Originala Neniu premio

Branĉo Traduka

1-a premio Hori Jasuo KN: J055

por "Florarba Vilaĝo kaj ŝtelistoj" de NIIMI Nankiĉi

2-a premio Tai Takasi KN: J216

por "Ludo" de MORI Oogai

3-a premio yamasita tosihiro (belmonto) KN: J255

por "Poemoj el Saisei kaj Tacuĵi"

de MUROU Saisei kaj MIJOŜI Tacuĵi

Alvenis 1 originalaĵo kaj 5 tradukaĵoj por la Konkurso.
La juĝantoj: Sibayama Zyun'iti, Doi Ĉieko.

3 La 18-a Hajpin-Premio



Premiato: S-ro LEE Nakkee

S-ro LEE Nakkee, en 1957 estante lernanto de la supera mezlernejo eklernis Esperanton en Daegu, Koreio, kun la influo de prof. Hong Heng-wi, kaj poste daŭrigis la studon kun la helpo de S-ro LEE Chong-Yeong. En 1980-aj jaroj kaj pli malfrue longe li estis estrarano kaj vicprezidanto de KEA. Tiam li pene laboris por stabiligo de la organizo de KEA, kaj prepari ĝian propran domon. En 2001 li redaktis kaj eldonis la biografion de Vivo de Hajpin LI, unu el la elstaraj pioniroj de korea Esperanto-movado. En 2010-aj jaroj kaj lastatempe li estis prezidanto de Zamenhof-Klubo, kaj nuntempe ofte verkas videajn dokumentojn por memori nian movadon.

* La Hajpin-Premio estas establita en 2001 okaze de la eldono de la biografio Vivo de Hajpin LI. Hajpin LI (1917-1997) estis batalanto por la korea sendependiĝo kontraŭ japana imperialismo. Li eklernis Esperanton de Elpin (AN Usaeng) en 1935, kiam li vivis en Ĉinio estante la batalanto. Li revenis al Koreio en 1946, kaj longe daŭris lia kontribuado por la korea Esperanto-movado, interalie kompilis kaj eldonis vortarlibrojn de Esperanta-korea kaj korea-Esperanta vortaroj. S-ro LEE Hyung Gin, la unua filo de Hajpin LI volis honori sian patron kaj kontribui al korea Esperanto-movado establis tiun ĉi premion.

4 La 15-a Premio de LEE Chong-Yeong

Premiato: Prof. KANG Byounghun KN: K019

Prof. Kang estas estrarano de Gyeongnam-a Filio de KEA kaj gvidanto de ĝia elementa kurso. Instruante Esperanton li kondukis multajn lernantojn al la membriĝo de KEA dum lasta unu jaro, kaj el ili ses personoj partoprenas en tiu ĉi kongreso.

5 Premiado al la Elstaraj Kontribuintoj al la Korea Esperanto-Movado

1) Rondo Kune (Reprezentanto: LEE Namhaeng (Feliĉa)) KN: K010

Rondo Kune estas organizita nur okaze de la 102-a UK, sed ĝi tre entuziasme agadas por sia studo, esperantista grupa vojaĝo, kaj ankaŭ por la amuzigo de esperantistoj. Multaj el ili partoprenas ankaŭ en tiu ĉi kongreso.

2) S-roj JEON Kyong-dok kaj YI Yong-chol

KN: K042

Tiuj ĉi du sinjoroj eklernis Esperanton meze de 1960-aj jaroj, sed krom en tiuj kelkaj jaroj, ili longe forestis de esperantujo. Sed jaron antaŭ la 102-a UK ili komencis reaktivadi kaj en multaj okazoj ili volontule laboris ofte duope, kaj daŭrigas tian agadon ankaŭ dum lasta unu jaro.

Esperanto en Japanio

MINE Yositaka, 2011

La unua japana esperantisto estis verŝajne la fama biologo Oka Asazirô, kiu lernis la lingvon en 1891 en Germanio. La lingvo tamen atingis la orientan landon, malproksiman de Eŭropo, nur en la fino de la 19-a jarcento.

En 1905, tuj post la japana-rusa milito, Edward GAUNTLETT, angla-lingva instruisto en Okayama, komencis gvidi korespondan kurson por japanoj kaj sukcesis varbi pli ol 600 lernantojn nur dum duonjaro. En 1906 unuaj lernantoj kaj simpatiantoj de la lingvo fondis la organizaĵon Japana Esperantista Asocio en Tokio, lanĉis la monatan organon “La Japana Esperantisto” kaj tuj okazigis la unuan kongreson. Eldoniĝis la unua libro por japanoj, “Sekaigo” (Mondlingvo), verkita de la konata verkisto HUTABATEI Simej. En la sama jaro aperis entute kvin lernolibroj kaj du vortaroj. Tio montras la furorecon de Esperanto en tiu jaro.

En Japanio post la japan-rusa milito pligrandiĝis interesiĝo pri la ekstera mondo, kaj la mondlingvo “Esperanto” tiel tiris atenton de intelektaj homoj, inter kiuj estis ankaŭ socialistoj kaj anarkiistoj. Ili taksis la lingvon kiel komunikilon de la tutmonda proletaro. Tiutempe la registaro tamen severe persekutis progresemaĵojn. Krome, mankis praktikaj okazoj de la lingvo en la tiama socio, ĉar kontakto kun alilandanoj estis tre malofta ĉe ordinarnaj homoj. Tiel la novnaskiĝinta movado baldaŭ perdis la intereson de la socio. Tamen fidelaj pioniroj persiste laboris por antaŭenigi la movadon spite la malfavorajn situaciojn. Pasis dekelkaj malfacilaj jaroj, ĝis aperis nova tajdo post la unua mondmilito kaj la rusa revolucio.

En 1919 junuloj, gvidataj de OSAKA Kenzi (Ossaka Kenji), fondis novan organizaĵon Japana Esperanto-Instituto (JEI) kun la nova organo “La Revuo Orienta” (LRO). La socio post la milito estis favora al la ideo de la internacia lingvo kaj ankaŭ al la homaranismo de Zamenhof. Aperis la japana traduko de “Vivo de Zamenhof” de Edmond PRIVAT, kaj la ideo de la kreinto de la lingvo forte kaptis la koron de junuloj. Naskiĝis grupoj en multaj universitatoj kaj altlernejoj kaj multaj urboj tra la tuta lando. La lingvo disvastiĝis ankaŭ inter laboristoj kiel ilo de la proleta klaso.

Esperanto fariĝis kvazaŭ modo de la tempo. Multaj gazetoj portis titolon per esperantaj vortoj, kiel Semanto, Emancipo, Rekonstruo, Pioniro, Scienco Proleta, Teatro ktp. Elementa kurso de la lingvo aperis ankaŭ en diversaj gazetoj ekster la movado. Komercaj eldonejoj eldonis lernolibrojn kaj aliajn. El ili la plej menciinda estas la 5-voluma “Proleta Kurso de Esperanto” en 1931. Ankaŭ la ŝtata radio disaŭdigis kursojn de Esperanto en 1927 kaj sekvantaj kelkaj jaroj.

Kelkaj libroj estis tradukitaj el Esperanto. Inter ili estis “Marta” el la traduko de Zamenhof. En 1931 oni eĉ produktis filmon de “Marta” surbaze de la japana traduko kun adapto al la japana socio.

Ankaŭ sciencistoj kaj medicinistoj lernis kaj provis praktiki la lingvon en siaj fakoj. Inter ili estis YAGI Hideo, kiu poste fariĝis prezidanto de UEA.

En tiu tempo la vicsekretario de Ligo de Nacioj, NITOBE Inazo fariĝis subtenanto de Esperanto laŭ instigo de siaj japanaj kolegoj-esperantistoj en Ĝenevo.

Tio ĉio okazis en la intermilita periodo. Tamen la kreskanta militarismo kaj la milito interrompis la movadon. La polico ne nur sufokis agadon de progresemluloj, sed ankaŭ suspektis simplajn esperantistojn, kiuj korespondis kun eksterlandaj amikoj.

JEI kaj esperantistoj tamen travivis la malfacilan periodon. En aŭgusto 1945, tuj post la milito, MIYAKE Sihei [Mijake Ŝihei], sekretario de JEI, anoncis, ke ĝi vivas kaj pretas rekomenci la movadon. Nur post kelkaj monatoj 72 esperantistoj kunvenis por la 32-a Japana Kongreso en la ruiniĝinta Tokio. Reaperis ĝia organo LRO. Esperanto denove disvastiĝis en diversaj kampoj de la nova kaj demokratiigita socio. Ĝi fariĝis unu el la simboloj de paco kaj libereco de la tempo.

En 1950 prestiĝa eldonejo, Iwanami-Shoten, eldonis japanlingvan biografion de Zamenhof verkitan de ITÔ Saburô kaj ĝi fariĝis unu el la furoraj libroj. Ec en lernejoj lernolibroj aperis biografia epizodo de la kreinto de Esperanto.

En 1951 pli ol dek lokaj grupoj en la regiono Kansai fondis novan organizaĵon, Kansaja Ligo de Esperanto-Grupoj (KLEG), kiu celas propran agadon surbaze de grupoj, dum JEI estas kolektivo de individuaj membroj. KLEG lanĉis monatan organon "La Movado", kiu poste fariĝis la komuna organo ankaŭ de aliaj ligoj en Kyûsyû, Tyûgoku-Sikoku kaj Tôkai.

Novaj esperantistoj provis praktiki la lingvon por komuniki al la mondo pri sociaj problemoj kaj fervore laboris por informi eksterlanden interalie pri la atombomboj kaj sekvoj en Hiroŝimo kaj Nagasako. Ili grupe esperantigis kontraŭnukleajn kaj porpacajn dokumentojn. Esperanto denove tiris atenton de la socio. Kelkaj ankaŭ aktivis en literatura verkado. MIYAMOTO Masao, kiu gvidis KLEG, multe verkis originale kaj traduke, vartante t.n. la japanan skolon.

En 1965 okazis la 50-a UK en Tokio kaj la 21-a IJK en Ootu apud Kioto, ambaŭ unuafoje en Azio. Okaze de tiuj kongresoj plivigliĝis la movado: aktivis studentoj kaj junuloj; la nombro de la organizitaj membroj superis entute kvar mil; aperis multaj libroj en kaj pri Esperanto. La kongreso montris la praktikecon de la lingvo al ordinara homoj, kaj tio instigis multajn el ili aktive partopreni sekvajn UK-ojn, kiujn ĉeesti estis nura revo por ordinara japanoj ĝis tiam. Ankaŭ la ekonomia evoluo de la japana socio tion helpis. Esperanto tiel evoluis de idea al praktika lingvo por japanoj.

Baldaŭ japanoj rimarkis, ke por la movado estas nepre necesa la disvastigo de la lingvo en aziaj landoj, kaj komencis strebi por tio. Junuloj ĉiujare organizis komunan seminarion (KS) inter Japanio kaj Koreio, al kiuj poste aliĝis ĉinaj kaj vjetnamaj junuloj. De kiam oni fondis Komisionon pri Azia Esperanto-Movado (KAEM) en la kadro de UEA en 1994, japanoj plenumadas ĝian kernan laboron: eldoni la bultenon "Esperanto en Azio" kaj helpi okazigon de Aziaj Kongresoj, ktp.

Tamen stagnas la movado en la lasta dudeko da jaroj. Ne nur mankas novaj lernantoj inter junuloj kaj malkreskas la nombro de la organizitaj esperantistoj, sed ankaŭ la movado jam ne tenas tiajn interesojn kaj prestiĝojn de la socio, kiajn akiris niaj antaŭuloj. Por rompi tian tendencon oni festis la jarcenton de la movado en 2006, kaj laŭ iniciato de JEI decidis refoje gastigi la UK.

En 2007 la 92a UK okazis sukcese en Jokohamo. Estas notinde, ke al la kongreso la japana esperantistaro invitis dudek esperantistojn el aziaj landoj por kontribui al la movado en Azio.

En 2010 Japana Esperanto-Junularo estis reorganizita kaj ĝia organo "La Junuloj", kiu estis lanĉita en 1992 kaj poste ĉesis regule aperi, reeldoniĝis. Nun la organo aperas regule kaj la membroj ricevas ĝin per reto. En junio de 2018 eldoniĝis n-ro 115.

La 98-a Japana Esperanto-Kongreso kaj la 43-a Korea Kongreso de Esperanto komune okazis en Koreio en 2011. Unuafoje la du landaj kongresoj okazis komune surbaze de multjara kontaktiĝo de esperantistoj en ambaŭ landoj, inkluzive la agadon por Komuna Seminario.

En 2013 okazis la 100-a Japana Kongreso kun 4-taga bunta programo. La kongresejon regis internacia etoso, kvankam ĝi estis landa kongreso, ĉar 48 el la 719 aliĝintoj venis el ekster Japanio.

En la sama jaro eldoniĝis "Biografia Leksikono de la Esperanto-Movado en Japanio". Ĝi enhavas priskribon pri 2867 esperantistoj. Estas notinde, ke ĝin eldonis ne-esperantista eldonejo.

Uzado de interreto pli kaj pli aktivas ankaŭ en Esperantio. Tvitero kaj Fejsbuko ligas esperantistojn kaj enlande kaj internacie. Samtempe eldonadoj de paperaj libroj kaj propagandiloj okazas same kiel antaŭe. Ni utiligu novajn kaj malnovajn manierojn por disvastigo de Esperanto.

La jaro 2015 estis la 125-a jaro post naskiĝo de ukraina esperantisto Vasilij Eroŝenko, kiu donis gravan influon al japana esperantio antaŭ la dua mondmilito. Okaze de la jubileo oni havis diversajn eventojn, interalie prelegkunvenojn kaj eldonon de libro pri li.

En 2017 aperis komputila virtuala ludo "Kotonoha Amrilato", en kiu Esperanto estas uzata. La ĉefrolantino estas transportita en fremdan mondon kaj iom post iom lernas tiean lingvon, nome Esperanton. Ludantoj nature lernas la lingvon. La ludon eldonis ne-esperanta eldonejo, sed en la preparado Japana Esperanto-Instituto kunlaboris. La ludo bone vendiĝas kaj altiras ne malmultajn junulojn, kiuj ĝis nun ne interesiĝis pri Esperanto. ●

Historio de Korea Esperanto-Movado

KIM Uson (2011)
kun modifo de Ho Song (2018)

Komenca periodo (1920-1945)

Ekde la 21a de junio ĝis la 29a de julio, 1920, Verda E. Kim (1896~?, poeto · literatura kritikisto) organizis kaj gvidis Esperanto-kurson ĉe YMCA en Seulo. Ĝi estis la unua publika Esperanto-kurso en Koreio, en kiu partoprenis 22 homoj. Tuj poste, oni fondis Korean Esperanto-Asocion kaj elektis Verda E. Kim (Korea nomo KIM Ok) kiel ĝian prezidanton.

En 1923 la unuan Esperanto-lernolibron eldonis SHIN Bong-jo (Espero P. Shin, pedagogo, 1900~1993), kiu poste fariĝis estro de Ewha Virina Supermeza Lernejo. En 1925, OYAMA Tokio (japano), kiu loĝis en Seulo, fondis klubon, Seula Esperanto-Klubo (SEK). SEK aktivis por disvastigi Esperanton. (Koreio estis japana kolonio dum 1910-1945). Sed tamen ekde la mezo de 1930-aj jaroj japana kolonia registaro devigis koreojn uzi nur japanan lingvon, subpremante Esperanto-movadon kaj korean lingvon. Ne malmultaj japanaj esperantistoj, loĝantaj en Koreio, kontraŭis la devigon.

Rekonstruo kaj dividiĝo de E-movado (1945-1975)

En 1945, kiam Koreio liberiĝis de la japana koloniado, koreaj esperantistoj tuj eklaboris por rekonstrui Esperanto-movadon. Korea Esperanto-Instituto (KEI) estis organizita en 1945, kaj la 1a Korea Kongreso de Esperanto okazis en aprilo 1946 en Seulo. Ĉirkaŭ 7 universitatoj adoptis Esperanton kiel regulan lern-objekton. La planita 4a Korea Kongreso de Esperanto en 1950, ne povis okazi pro subita eksplodo de Korea Milito en junio. Multaj el la ĉefaj gvidantoj de la movado mortis, aŭ malaperis, kaj iuj estis perforte forprenitaj al Norda Koreio.

Prof. HONG Heng-Wi (1911~1968) kaj multaj aliaj aktivuloj siatempaj forlasis Seulon pro la milito kaj transloĝiĝis en la urbon Daegu, kaj tie rekonstruis la movadon surbaze de la helpo de la Universitato Chunggu. En 1956 KEI estis refondita en Daegu. En 1957 en la urbo okazis la 4a Korea Kongreso de Esperanto. Multaj junuloj kaj studentoj vigle aktivis en Daegu.

En 1966, Korea Esperanto-Societo (KES) estis fondita en Seulo kaj ĝin gvidis ĉefe tiutempaj aktivaj junuloj de la urbo. KEI daŭre sidis en Daegu, kaj la movado en Seulo ne estis tiel vigla. Pro tio oni translokigis KEI al Seulo en 1969. La du dividitaj grupoj kaŭzis konfliktojn. Oni do sentis neceson unuigi ilin. Post kelkvara klopodo de la movadaj gvidantoj, finfine en la 31a de aŭgusto 1975, KES estis unuigita al KEI. Kaj oni nomis la organizaĵon Korea Esperanto-Asocio (KEA). De tiam KEA daŭras ĝis nun.

Post la unuiĝo (1975-1990)

Ekde 1975, la landa kongreso regule okazas ĉiujare. Kaj en oktobro de lasta jaro okazis la 42a Kongreso. Diversaj Esperanto-kursoj estis organizitaj de diversaj

grupoj, tutlande kaj loke. Por certigi la lingvan nivelon de esperantistoj KEA okazigas Esperanto-ekzamenojn de elementa, meza kaj supera gradoj. Multaj studrondoj, kvankam malgrandaj, estis fonditaj, sed plejmulto de ili ne povis longe daŭri. Religiaj organizaĵoj, speciale Ŭonbulismo, eldonis esperantajn versiojn de sanktaj libroj kaj instruoj.

La ‘Komuna Seminario (KS) inter Japanaj kaj Koreaj Junularoj’ ĉiujare okazis de 1982 ĝis hodiaŭ(2018). Ĝin fondis Japanaj kaj Koreaj Junularoj por fortigi amikecon kaj aktivadi por Esperanto-Movado. En 1994 ankaŭ Ĉina kaj poste ankaŭ Vjetnama Junularoj aliĝis, do nun okazas Komuna Seminario(KS).

La prospera periodo (1991-2018)

En 1994, Koreio gastigis 3 grandajn internaciajn eventojn en Esperantujo: la 79a Universala Kongreso (1776 aliĝintoj el 66 landoj), la 50a Internacia Junulara Kongreso (241 aliĝintoj el 28 landoj), kaj la 28a ILEI (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj) -Konferenco (48 aliĝintoj el 25 landoj). En 2002, okazis la 3a Azia Kongreso en Seulo (552 aliĝintoj el 15 landoj).

Ekde 1999 KEA festas la Tagon de Pioniro en majo, por rememori forpasintajn pionirojn de korea Esperanto-movado, kaj ĉiujare eldonis memorlibron de la pioniro ĝis 2012 por 12 pioniroj. Poste ankaŭ en 2015, sed poste ĝis nun(2018) daŭras nur ceremonioj.

Esperanto-kursoj okazadis en la oficejoj de KEA kaj ĝiaj filioj de Busan, Daegu, Incheon ĉiujare kelkfoje. KEA organizas tutlandan kurskunvenon vintre kaj somere, dum 2 tagoj. Kaj Namkang Esperanto-Lernejo aranĝas 2-tagan kurskunvenon printempe kaj aŭtune. Seula Esperanto-Kulturcentro, privata institucio por Esperanto-instruado, regule instruas Esperanton ekde 1991.

Esperanto estis ofte instruata kiel la 2a fremda lingvo en 3 universitatoj: la Universitato Dankook (prof-oj LEE Jungkee kaj MA Young Tae), la Universitato Wonkwang (prof. LEE Jungkee) kaj la Hankuk Universitato de Fremdaj Studoj (prof. LEE Young-Koo), sed nun ekde lastaj kelkaj jaroj en 2 universitatoj nome, Hankuk Universitato de Fremdaj Studoj (prof. LEE Young-Koo) kaj Universitato Kyunghee (prof. LEE Jungkee). Ĉirkaŭ 300 studentoj lernas ĝin en unu semestro. Se la studentoj deziras partopreni la tutlandajn Esperanto-kurskunvenojn, esperantistoj ilin subtenas per mondonacoj.

En 2011, KEA kun Japanaj Esperanto-Instituto organizis la 1-an Komunan Esperanto-Kongreson de Japanio kaj Koreio en Seongnam, Koreio, kaj ĉi-jare (2018) okazas ĝia dua Kongreso en Nara, Japanio.

En 2017, Koreio denove gastigis 3 grandajn internaciajn eventojn: la 102-a Universala Kongreso en Seulo, la 50a ILEI-Kongreso en Busan, kaj la 90a SAT-Kongreso en Gimpo. La SAT-Kongreson unuan fojon en Azio. Oni taksas ilin tre sukcesaj.


Nuntempaj koreoj kaj koreaj esperantistoj tre efike utiligas interretan teknikon, kaj ankaŭ por Esperanto-movado per reta uzado oni efike studas kaj disvastigas informojn, kaj ankaŭ enlande kaj internacie babiladas kaj konversacie studas grupe. Ofte per Skajpo, Fejsbuko kaj aliaj.

Malsame kiel en antaŭ dekoj da jaroj, nunaj koreaj esperantistoj multe partoprenadas en UK, ILEI-Kongreso kaj aliaj eventoj.●

NARA,

la eksĉefurbo en malproksimaj tagoj

Nara Esperanto-Societo



E N H A V

- 1 Antaŭparolo
- 2 La monto Nizyô-san, ŝtona re
- Epizodo 1 - La princo Ôtu kaj
- 3 La ruinoj Kitui en la epoko Z
- 4 La ruinoj Karako-Kagi en la
- 5 La tumulo Hasihaka
- 6 La Sepbranĉa Glavo el la K
- 7 La epoko Asuka
- 8 La tumuloj Takamatuzuka kaj Kitora
- 9 Asuka-dera, la unua budhisma templo
- La templo Hôryû-zi
- Epizodo 2 - La murpentraĵo en Kondô de Hôryû-zi
- 10 La ŝintoisma sanktejo Kasihara-zingû
- 11 La ruinoj de la antikva metropolo Heizyô-kyô
- 12 La templo Tôdai-zi
- Epizodo 3 - "O mizu tori"
- 13 La ŝintoisma sanktejo Kasuga-taisya
- 14 La templo Kôhuku-zi
- Epizodo 4 - Verkisto MORI Ôgai kaj "Zion-ne"
- 15 La templo Tôsyôdai-zi
- Epizodo 5 - Okuloj de Jianzhen
- 16 La templo Yakusi-zi
- 17 Cervoj en la parko Nara
- 18 La kastelo Kôriyama
- 19 Konstruaĵoj en la epoko Meizi
- 20 Trezorejo Syôsô-in
- Epizodo 6 - "Kvindek Utaoj en Nara" de MORI Ôgai
- 21 La templo Zyôkyô-zi kaj Ernest Francisco FENOLLOSA
- 22 MASAOKA Siki, hajkisto kaj persimono
- 23 Memora domo de Ŝtata Virina Universitato de Nara
- Postparolo
- Fonto de bildoj
- Skribmaniero kaj prononco de japanaj vortoj

Programo

12a (vendredo)

Horzono		12A1	12A2	12P0	12P1	12P2	12P3
horo		9:00–10:50	10:50–12:15		13:30–14:55	15:10–16:35	17:00–19:00
Kultura Domo etaĝo 1	Dom10 (Halo)						
	Dom12						
	Dom13	Salono 1 (akceptejo / deponejo / budoj)					
Kultura Domo etaĝo 2	Dom20 (Halo)				[K01B] Prelegoj (GIM In-hong) (SO Jinsu)	[K02] Simpozio de K-io k J-io	[K04] Interkona Vespero
	Dom2S	(Preparo)			Salono 2 (libroservo / budoj)		
	Dom2A				[F03] Kaligrafio	[F27] Koreaj Nutraĵoj	
	Dom2B		[F01] La Espero	[F02] Fukuŝima	[F04] Sumoo	[F05] Jacugatake	[F08] Goo
	Dom2C				[F06] JEMA, JESA	[F09] ILEI-JP	
	Dom2D					15:00- [F30] Hasegawa Teru	
	Dom2E				[F29] ILEI-JP/KR		
	Dom2F	LKK					
	Dom2G	ripozejo					
	Dom2H						
Jamato etaĝo 2	Jam21						
	Jam22						
Jamato etaĝo 4	Jam41					[F10] Junuloj	
Jamato etaĝo 5	Jam51					[F11] Pasporta Servo kaj Delegitoj	
	Jam52					[K03] plibonigu prononcon (por koreo)	

13a (sabato)

Horzono		13A1	13A2	13P0	13P1	13P2		13P3
horo		9:10–10:00	10:00–11:45		13:30–14:55	15:10–16:35		
Kultura Domo etaĝo 1	Dom10 (Halo)		[K05] Inaŭguro*		[K07] Publikaj Programeroj 13:30–16:50			
	Dom12				[F13] Oomoto	[F16] Konstitucio de Koreio		
	Dom13	Salono 1 (akceptejo / deponejo / budoj)						
Kultura Domo etaĝo 2	Dom20 (Halo)				[K08] Kunsido de KEA	[K01A] Prelego (Gabor)		
	Dom2S	Salono 2 (libro servo / budoj)						
	Dom2A				al Dom2C	[K01C] Prelego (Ossaka)	[K13] Oratora Konkurso	
	Dom2B				[F14] SAT			
	Dom2C	[K06A] Infana Kurso (1) 9:30–11:45			[F12] Kantu kun Ĵunko			
	Dom2D							
	Dom2E	(preparo de Te-ceremonio)			12:30 - [K09] Te-ceremonio (folia)			
	Dom2F	LKK						
	Dom2G	(preparo de Te-ceremonio)			[K10] Te-ceremonio (pulvora)			
	Dom2H	ripozejo						
Jamato etaĝo 2	Jam21				[K11] Ekzamenoj laŭ JEI (skriba) –16:00			
	Jam22				[K11] Ekzamenoj laŭ JEI (parola) –16:00			
Jamato etaĝo 4	Jam41				[F28] Ulrich Lins			
Jamato etaĝo 5	Jam51				[F15] Kristanoj	[F17] KS 35-jara		
	Jam52				[K12A] Studraporta kunsido(1)	[K12B] Studraporta kunsido(2)		
Hotelo Nikko Nara							[K14] Bankedo 18:30–20:30	

*Post la Inaŭguro ni kune fotiĝu en la Kultura Domo.

*Por tagmanĝo ni ne povas uzi la halon Dom10.

14a (dimanĉo)

Horzono		14A1	14A2	14P0	14P1
horo		9:10–10:35	10:50–12:15		13:30–15:00
Kultura Domo etaĝo 1	Dom10 (Halo)				
	Dom12	[F19] Portretado de Zamenhof	[K17] Enkonduka Kurso		
	Dom13	Salono 1 (akceptejo / deponejo / budoj)			
Kultura Domo etaĝo 2	Dom20 (Halo)	[F18] Kantu	[F23] Folkloro Danco		[K19] Fermo
	Dom2S	Salono 2 (libroŝerbo / budoj)			
	Dom2A	[K01D] Prelego (Vergara)	[F24] Blinduloj		
	Dom2B	[K15] Azia Agado	[K18] Kunsido de JEI		
	Dom2C	[K06B] Infana Kurso (2) 9:30–12:00			
	Dom2D				
	Dom2E	[K16] KKK (fermita)			
	Dom2F	LKK			
	Dom2G	ripozejo			
	Dom2H				
Jamato etaĝo 2	Jam21	[F07] Japana-E-a Vortaro (fermita)	[K01F] Prelegoj de la Invitoj		
	Jam22				
Jamato etaĝo 4	Jam41	[F20] Universitateto	[F25] Budhano		
Jamato etaĝo 5	Jam51	[F21] IKEF	[F26] IKEF-JP		
	Jam52	[F22] Zubunto	[K01E] (Prelego) lingvoj J kaj K		

*07:30 - 09:00 okazos Frumatena Promenado [K20].

*Por tagmanĝo ni ne povas uzi la ĉambrojn Dom2C–2H.

Laŭhora listo de programeroj

12a (vendredo)

mallongigo	kodo	ĉambro
10:50–11:30 La Espero	F01	Dom2B
11:35–12:15 Hajkoj de Fukuŝima	F02	Dom2B
12:15–13:30 tagmanĝo		
13:30–14:10 Sumoo	F04	Dom2B
13:30–14:55 Kaligrafio	F03	Dom2A
JEMA, JESA	F06	Dom2C
Prelego (GIM Inhong, SO Jinsu)	K01B	Dom20
ILEI-JP/KR	F29	Dom2E
14:15–14:55 Jacugatake	F05	Dom2B
15:10–16:35 Hasegawa Teru	F30	Dom2D
15:10–16:35 Simpozio de Koreio kaj Japanio	K02	Dom20
Koreaj Nutraĵoj	F27	Dom2A
Goo	F08	Dom2B
ILEI-JP	F09	Dom2C
Junuloj	F10	Jam41
Pasporta Servo kaj Delegitoj	F11	Jam51
plibonigu prononcon	K03	Jam52
17:00–19:00 Interkona Vespero	K04	Dom20

13a (sabato)

mallongigo	kodo	ĉambro
9:30–11:45 Infana Kurso (1)	K06A	Dom2C
10:00–11:45 Inaŭguro	K05	Dom10
11:45–12:00 fotado		
12:00–13:30 tagmanĝo		
12:30–16:35 Te-ceremonio (folia)	K09	Dom2E
13:30–16:50 Publikaj Programeroj 無料公開番組	K07	Dom10
13:30–14:55 Kantu kun Ĵunko	F12	Dom2C
Kunsido de KEA	K08	Dom20
Oomoto	F13	Dom12
Kristanoj	F15	Jam51
Studraporta kunsido (1)	K12A	Jam52
Ulrich Lins	F28	Jam41
13:30–16:00 Ekzamenoj laŭ JEI	K11	Jam21/22
13:30–16:35 SAT	F14	Dom2B
Te-ceremonio (pulvora)	K10	Dom2G
15:10–15:50 Prelego (Premio Ossaka)	K01C	Dom2A
15:10–16:35 Prelego (Gábor)	K01A	Dom20
Konstitucio de Koreio	F16	Dom12
KS 35-jara	F17	Jam51
Studraporta kunsido (2)	K12B	Jam52
15:55–16:35 Oratora Konkurso	K13	Dom2A
18:30–20:30 Bankedo	K14	

14a (dimanĉo)

<u>mallongigo</u>	<u>kodo</u>	<u>ĉambro</u>
7:30– 9:00 Frumatena Promenado	K20	vidu p. 42
9:10–10:35 Prelego (Vergara)	K01D	Dom2A
Kantu	F18	Dom20
Portretado de Zamenhof	F19	Dom12
Azia Agado	K15	Dom2B
KKK (fermita)	K16	Dom2E
Japana-Esperanta Vortaro (fermita)	F07	Jam21
Universitateto	F20	Jam41
IKEF	F21	Jam51
Zubunto (komputilo)	F22	Jam52
9:30–12:00 Infana Kurso (2)	K06B	Dom2C
10:50–12:15 Enkonduka Kurso 無料入門講習会	K17	Dom12
Folkloro Danco	F23	Dom20
Blinduloj	F24	Dom2A
Kunsido de JEI	K18	Dom2B
Prelegoj de la Invititoj	K01F	Jam21
Budhano	F25	Jam41
IKEF-JP	F26	Jam51
lingvoj J kaj K	K01E	Jam52
12:15–13:30 tagmangō		
13:30–15:00 Fermo	K19	Dom20

dum tagoj

<u>mallongigo</u>		<u>ĉambro</u>
Libroservo		Salono 2
Budoj		Salono 1, 2
Ekspozicio de Pentraĵoj		Salono 2

Kodo “K--” estas por Kongrestema Programero.
Kodo “F--” estas por Fakkunsido.

Ĉambroj “Dom--” troviĝas en Kultura Domo de Gubernio Nara.
(ĉefkongresejo)

Ĉambroj “Jam--” troviĝas en Kunsidoj Jamato,
ĉirkaŭ 3 minutojn piede de la ĉefkongresejo.
Vidu mapon sur la dorsokovrilo.

Klarigo de Kongrestemaj Programeroj

kodo	titolo	tago	horo	ĉambro
------	--------	------	------	--------

K01A	Prelego (Gábor)	13a (sab)	15:10–16:35	Dom20
------	-----------------	-----------	-------------	-------



Prelegos Márkus Gábor. Komitatano de UEA, prezidanto de Eŭrazia Kultura Centro.

De Animala Ekzisto ĝis la Diĝo

- La sepdekmiljara historio de homa kulturo

Trarigardante la sepdekmiljaran historion de homa kulturo li mencias pri nia lingvo.

K01B	Prelegoj (Gim Inhong, So Jinsu)	12a (ven)	13:30–14:55	Dom20
------	---------------------------------	-----------	-------------	-------



13:30–14:10 prelegos Gim Inhong. Eksprofesoro pri psikologio, pedagogio. Doktoro de filozofio, doktoriĝis en Germanio ĉe Universitato Bonn.

psikologiaj aspektoj de la kultura komuneco kaj diverseco

vivante aŭ por supervivi ĉiuj vivuloj, ĉu bestoj aŭ homoj, bezonas siajn proprajn programojn. por bestoj la programo nomata la instinkto sufiĉas ĉar ili vivas senĝene laŭ ĝia ordono. sed ĉe la homo la instinkto estas rudimenta kaj ĝia funkcio estas ege limigita. tial la homo bezonis alian programon ol instinkton por supervivi nomantan "la kulturon". la esenco de la kulturo estas laŭesence ne absoluta sed relativa. rezulte ekzistas komunecoj kaj diversecoj de la kulturo laŭ landoj kaj regionoj. ĉi-prelego traktas pri psikologiaj aspektoj de la kultura komuneco kaj diverseco.



14:15–14:55 prelegos So Jinsu. Profesoro de Universitato Kangnam.

La 'Azio' kaj Esperanto-Movado: Diverseco supera ol komuneco

Azio, geografie plej vasta, loĝantare plej multa, kaj ekonomie plej rapide evoluanta en la mondo, ludas la gravajn rolojn en la 21a jarcento. Kaj la vasta Azio dividebla grandskale en 5-6 regionoj montras siajn specifajn karakterojn en multegaj flankoj. Azia kontinento ja havas buntajn diversecojn politike, ekonomie, socie, religie, rase, kulture kaj tradicie.

La karakteroj tiom influas samtempe Esperanto-movadon, kiu vere varias laŭ landoj. Mi prezentos spertojn pri aziaj esperantistoj, organizoj kaj landoj. Venu kaj vidu la diversecojn de ni, Azio. Vi estas invititaj al bunta Azio okaze de la Komuna Kongreso, kiun vi povas gustumi malmulte en landaj kongresoj.

K01C	Prelego (Premio Ossaka)	13a (sab)	15:10–15:50	Dom2A
------	-------------------------	-----------	-------------	-------

Parolos HARADA Hideki, la premiito de Premio Ossaka en 2018.

kodo titolo tago horo ĉambro

K01D Prelego (Vergara)

14a (dim) 09:10–10:35 Dom2A



Prelegos José Antonio VERGARA (Ĉilio): Ŝanĝiĝintaj ide(ologi)oj pri la rolo de Esperanto en multlingva/multkultura mondo.


Tra la tuta historio de la fenomeno Esperanto, la homoj ligitaj al ĝi konceptis sin mem jen kiel movadon sur la lingva kampo, jen kiel komunumon de lingvouzantoj. Tiu duaspecta karaktero speguliĝis en diversaj nocioj pri la celo kaj loko de la interlingvo (ekz. la iama movada-en-movada devizo "per Esperanto al socialismo"). Dum la lastaj jardekoj, iĝis rimarkebla idea transiro de Esperanto el la tradicia niĉo de proponita sed daŭre ignorata "solvo" por iu "monda lingvo-problemo", al aktivularo por lingva diverseco kiel savenda beno de la homaro. Ĉu tiu evoluo estas sencohava kaj mobiliza al la japanaj kaj koreaj esperantuloj?

K01E lingvoj japana kaj korea, antikve kaj moderne

14a (dim) 10:50–12:15 Jam52

Prelegos belmonto, yamasita tosihiro.

ĝenerala lekcio, ne profesia. oni diras, ke la du lingvoj estas tre similaj, kaj fakte oni povas lerni la lingvojn pli facile ol aliajn lingvojn. ĉu ili estas ĝemelaj? ni lernos antikvan formon de la lingvoj, kaj kiel ili evoluis propra-maniere. 한국어와 일본어는 형제언어인가? 日韓の言語は兄弟の言語なのか (LKK)



K01F Prelegoj de la Invititoj

14a(dim)

10:50–12:15 Jam21



Parolos la invititoj: Dương Tú Kiêu el Vjetnamio, kaj Mondero (Shin Hyunkyū) el Koreio

- Kiel kuros la venonta Azia kongreso en Danan, Vjetnamio?
- Junulara Movado en Koreio - Kien kaj Kiel?

K02 Simpozio de Koreio kaj Japanio

12a (ven)

15:10–16:35 Dom20

Parolos HO Song, KIM Seonwook (Suno), Yosii Sigeko, Kitagawa Syozi. Prezidos Satoo Morio.

- Temo: Interamikiĝo inter koreoj kaj japanoj.
 Celo: La du landoj spertis malamikajn tempojn en historio, ili tamen estis kvazaŭ fratoj origine. Sekve ni devas esti amikaj landoj kaj ni deziras interamikiĝi pli ol ĝis nun.
 Enhavo: Komence kvar homoj (2 koreoj kaj 2 japanoj) parolos pri aŭ siaj spertoj aŭ historietoj, kiuj atestas amikecajn faktojn inter la du landoj. Poste okazos diskutado inter aŭskultantoj kaj la parolantoj.
 (LKK / Kitagawa Syozi)

kodo	titolo	tago	horo	ĉambro
------	--------	------	------	--------

K03 plibonigu vian prononcon en lingvoj E kaj J (por koreo)

12a (ven) 15:10–16:35 Jam52



unua duono estas pri Esperanto: **posta duono** pri japana lingvo.

aŭdante vian parolon, ni tuj ekkonas, ke vi estas koreo, ĉar via prononco dependas de via denaska lingvo. mi klarigos kiamaniere fari vian Esperanton pli bela, kaj vian japanlingvon pli komprenebla.

에스페란토와 일본어의 발음을 개선합니다. 自分の発音を直しましょう.

(LKK / belmonto)

K04 Interkona Vespero

12a (ven) 17:00–19:00 Dom20

Ni amuziĝu per diversaj prezentaĵoj sur scenejo, ekzemple, per koruso, paper-teatraĵo, danco, konciza klarigo pri fakkunsidoj, ktp.

K05 Inaŭguro

13a (sab) 10:00–11:45 Dom10

1. Deklaro de malfermo
2. Kanto "La Espero"
3. Salutoj de Organizantoj, la prezidantoj de JEI, KEA
4. Saluto de la prezidanto de LKK (KIMOTO Yasuhiro)
5. Salutoj de gastoj kaj invititoj
6. Prezento de gratulmesaĝoj
7. Muzika Paŭzo (NODA Ĵunko)
8. Festo-paroloj

KAŬANIŜI Tecuroŭ

PARK Yongsung (Nema)

*Post la Inaŭguro ni faros komunan fotadon.



K06A Infana Kurso (1)

13a (sab) 09:30–11:45 Dom2C

Gvidos KANEKO Akemi (Karotino) kaj LEE Junghee (Hela)

Por bazlernejoj la kurso de Esperanto okazos.

Ni amuze lernu Esperanton. Kune ludu, kantu kaj ĝuu Esperante!

K06B Infana Kurso (2)

14a (dim) 09:30–12:00 Dom2C

Gvidos KANEKO Akemi (Karotino) kaj LEE Junghee (Hela)

Daŭrigo de (1).

Por bazlernejoj la kurso de Esperanto okazos.

Ni amuze lernu Esperanton. Kune ludu, kantu kaj ĝuu Esperante!

kodo	titolo	tago	horo	ĉambro
------	--------	------	------	--------

K07 Publikaj Programeroj	13a (sab)	13:30–16:50 Dom10
---------------------------------	------------------	--------------------------

13:30 - 14:20 Prelego: Naskiĝo de Budhismo Kulturo en Japanio



Prelegos **japane**: SENDA Minoru. Estro de Biblioteko kaj Informa Centro de Gubernio Nara, Emerita Profesoro de Internacia Esplora Centro por Japanaj Studoj 日本語で

Nun budhisma kulturo estas unu parto de japana kulturo. Budhismo naskiĝis en Barato kaj enkondukita en Japanio tra Silka Vojo, Ĉinio kaj Korea Duoninsulo. Ĝi adaptiĝis al japana klimato, kaj naskiĝis japana budhana kulturo. La preleganto klarigos la procedon. 日本における仏教文化の成立

14:30 - 14:50 Prezentaĵo de “Baleta Studio Esperante”

La baleta studio kiu koincide havas la nomon, situas en Gubernio Nara. Ni ĝuu belan prezentadon. バレエスタジオ「エスペラート」の発表

15:00 - 16:50 Prelego: Nuntempa Internacia Situacio en Orienta Azio el la vidpunkto de “Kroniko de la Tri Regnoj”



Prelegos **japane kun esperanta interpretado**: KIM Moonkyong / KIN Bunkyo. Profesoro de Universitato de Tsurumi (Jokohamo), emerita profesoro de Universitato de Kioto. 日本語で (エスペラント通訳つき)

Nun Korea Duoninsulo, Japanio kaj Ĉinio estas en streĉita situacio. Jam en antikva epoko internacia situacio en Orienta Azio enhavis gravan senharmonion. La preleganto klarigos la problemon el la vidpunkto de “Kroniko de la Tri Regnoj”, en kies epoko ĝermis la problemo. 『三国志』からみる東アジア現代国際情勢。

K08 Ĝenarala Kunsido de KEA	13a (sab)	13:30–14:55 Dom20
------------------------------------	------------------	--------------------------

1. Kanto La Espero
2. Festparolado de la Prezidanto de KEA
3. Paroladoj de eminenta(j) kaj nova(j) membroj de KEA por festi la kongreson
4. Transdono de la verda standardo al la Gyeongnam-a Filio de KEA
5. Parolado de la reprezentanto de la Gyeongnam-a Filio de KEA

K09 Te-ceremonio (folia) 煎茶	13a (sab)	12:30–16:35 Dom2E
------------------------------------	------------------	--------------------------



En ĉi tiu kongreso mi servos folian verdan teon al partoprenantoj laŭ maniero de **Bifuu**.

Folia te-ceremonio komenciĝos je (1) 12:30, (2) 13:30, (3) 14:30 (4) 15:30, kaj daŭros 30 minutojn. En unu folia te-ceremonio mi akceptos nur 5 gastojn.

Po unu teo kun kuko kostas 200 jenojn. (HONDA Terumi)

kodo	titolo	tago	hor	ĉambro
------	--------	------	-----	--------

K10 Te-ceremonio (pulvora) 抹茶	13a (sab)	13:30–16:35	Dom2G
--------------------------------------	------------------	--------------------	--------------



Okaze de la komuna kongreso en Nara feliĉe mi povos prepari verdan teon por vi! Bonvolu viziti mian ĉambron kaj trinku japanan tradician teon! Mi atendas vian viziton! Por unu taso da teo kun bongusta kuko kostas 200 jenojn.
(Sunjo, HUZIMOTO Hideko)

K11 Kvalifikaj Ekzamenoj de Esperanto laŭ JEI

13a (sab) 13:30–16:00 Jam21/22

Ekzameno por mezuri lingvonivelon de japanaj esperantistoj. Necesas antaŭa aliĝo.

K12A Studraporta kunsido de JEI (1) 13a (sab) 13:30–14:55 Jam52

Ĉiuj prelegoj okazos en Esperanto.

1. BAK Giwan (gastopreleganto)

- Ĉu Tokia Universitato estas la universitato en Tokio? -

Demando pri la adjektiva formo de loknomoj. Se temas pri la propraj nomoj enhavantaj loknomojn, ekzemple la nomoj de universitatoj ktp., la problemo naskas seriozan problemon.

2. Aikawa Takuya

- "Korea antologio de noveloj" kaj tradukado de korea literaturo -

Trarigardo pri la historio de tradukado de korea literaturo en Esperanton kaj la japanan. Kaj pri kapableco de tradukado, kiu povas vastigi la limon de korea literaturo trans “nacian literaturon” (minjok munhak).

K12B Studraporta kunsido de JEI (2) 13a (sab) 15:10–16:35 Jam52

3. SASAKI Teruhiro

- Praktika filozofio de Mozi – kritika penso kaj utilismo –

Je la filozofia sistemo de Mozi estas grava la persono, kiu, precize observante, distingas utilecon kaj kritikas ĝuste. Tio estas mirinde progresema eĉ en moderna epoko.

4. KADOJA Hidenori

- Kiel oni povas sisteme kompreni la esperant-movadan historion en Japanio dum la faŝisma periodo? -

Analizante antaŭmilitan movadon, la raportanto provas prezenti hipotezon, ke forta daŭreco estas observebla, tuj post la naskiĝo de Esperanto, tra fluoj de homaranismo kaj pacifismo en esperantujo, al faŝismo.

kodo	titolo	tago	horo	ĉambro
------	--------	------	------	--------

K13	Oratora Konkurso	13a (sab)	15:55–16:35	Dom2A
------------	-------------------------	------------------	--------------------	--------------

1. Oratoru en Esperanto
2. La temo estu kongresa temo "Diverseco kaj komuneco de kulturoj - en Esperanto"
3. Rajtas partopreni gejunuloj malpli aĝaj ol 35-jaraj
4. Oratoru maksimume 6 minutojn (LKK / Tahira Masako)

K14	Bankedo	13a (sab)	18:30–20:30	
------------	----------------	------------------	--------------------	--

Loko: Hotelo Nikko Nara. Vidu p. 42 por preciza informo.

K15	Azia Agado	14a (dim)	09:10–10:35	Dom2B
------------	-------------------	------------------	--------------------	--------------

Koncize raportigo movado en Koreio, Vjetnamio, Irano kaj Japanio (JEJ, JEI), kaj konsisto de KAEM kun bildo de azia movado. Prezentiĝos la 9-a Azia Kongreso de Esperanto okazonta ekde la 25-a ĝis la 28-a de aprilo 2019 en Danang, Vjetnamio. Sekvos libera diskuto.

K16	Konstanta Kongresa Komitato de JEI (fermita)			
------------	---	--	--	--

		14a (dim)	09:10–10:35	Dom2E
--	--	------------------	--------------------	--------------

Konstanta Kongresa Komitato(KKK) havas regulan kunvenon ĉiujare dum japana kongreso. Ĝi celas daŭran okazigon de japana kongreso pere de interŝanĝoj de spertoj kaj opinioj de organizantoj.

K17	Enkonduka Kurso (por japanoj)	14a (dim)	10:50–12:15	Dom12
------------	--------------------------------------	------------------	--------------------	--------------



Gvidota en la japana. 日本語で講習

Por tiuj, kiuj ankoraŭ ne eklernis Esperanton. Post 85-minuta lernado vi jam povos legi facilajn frazojn en Esperanto.

エスペラントにはじめて接する人が対象です。85 分間の速成講習で、簡単なエスペラント文が読めるようになります。(LKK / HUZIMAKI Ken'iti)

K18	Ĝenerala Kunsido de JEI	14a (dim)	10:50–12:15	Dom2B
------------	--------------------------------	------------------	--------------------	--------------

- 1 Saluto de la Prezidanto
- 2 Sinprezentado de la estraranoj
- 3 Honorigo de longdaŭraj membroj (p. 49)
- 4 Raporto pri la lasta jaro kaj plano por tiu ĉi jaro
- 5 Aldonaj raportoj kaj planoj de la fakoj
- 6 Demandoj kaj respondoj

kodo	titolo	tago	horor	ĉambro
------	--------	------	-------	--------

K19 Fermo	14a (dim)	13:30–15:00	Dom20	
------------------	------------------	--------------------	--------------	--

1. Kantoj (fakgrupo “Kantu en Esperanto”)
2. Raporto de la Kongreso
3. Premiadoj
4. Transdono de la kongresa flago (Nara al Saitama)
5. Invito al la 106a Japana Esperanto-Kongreso
6. Invito al la 51a Korea Kongreso de Esperanto
7. Prezento de LKK-anoj kaj helpanto
8. Kanto "La Tagiĝo"
9. Deklaro de fermo

K20 Frumatena Promenado	14a (dim)	07:30–09:00	ekstere	
--------------------------------	------------------	--------------------	----------------	--

Vidu p. 42 por preciza informo.



Klarigo de Fakkunsidoj

kodo	titolo	tago	hor	ĉambro
------	--------	------	-----	--------

F01 Parkera kantado de La Espero 12a (ven) 10:50–11:30 Dom2B
 La Espero estas grava himno de Esperanto. Partoprenantoj kantu ĝin
 parkere en tiu ĉi kunsido. (HORI Jasuo)

F02 Hajkoj kaj tankaĵoj pri la Fukuŝima-Katastrofo
 12a (ven) 11:35–12:15 Dom2B
 Fukuŝima ankoraŭ multe suferas pro la nuklea akcidento. En tiu ĉi kunsido
 ni kune legos la libron "Hajkoj kaj tankaĵoj pri la Fukuŝima-Katastrofo".
 (HORI Jasuo)

F03 Kaligrafio Korea (Hangula) kaj Japana



12a (ven) 13:30–14:55 Dom2A
 Gvidas HO Song kaj FUJII Yumiko.

Bonvenon, ĉiuj interesitoj!
 Ĝuu kaj provu kaligrafi hangulan kaj japanan! (FUJII Yumiko)

F04 Esperanto-Sumoo 12a (ven) 13:30–14:10 Dom2B

Esperanto-Sumoo estas iniciatita de HORI Jasuo por ke
 esperantistoj legu pli multe da Esperanto-libroj. En la
 kunsido ni interŝanĝos la spertojn. (HORI Jasuo)



F05 Jacugatake-Esperanto-Domo 12a (ven) 14:15–14:55 Dom2B



Ni invitas vin al Jacugatake-Esperanto-Domo, montrante
 belajn fotojn pri la Domo kaj la ĉirkaŭaĵoj. (HORI Jasuo)

F06 Medicinistoj kaj Sciencistoj en Japana Esperantujo

12a (ven) 13:30–14:55 Dom2C
 Ĉu Esperanto havas altan rendimenton kiel pivota lingvo inter multaj
 lingvoj? Ĉi foje estas raporto pri "Konversacia kajereto E-Portugala" por
 UK-vojaĝanto al Lisbono. (Sano Hiroshi)

F07 Konsiliĝo pri la nova Japana-Esperanta Vortaro (fermita)

14a (dim) 09:10–10:35 Jam21
 Kunsido de la komisionanoj kaj helpantoj. Sed tiuj kiuj interesiĝas pri la
 projekto kaj pretas helpi en iu ajn kampo estos allasotaj. (Isino yosio)

F08 Japana Esperantista Go-asocio 12a (ven) 15:10–16:35 Dom2B

Goo estas internacia ludo. En tiu kunsido ni instruas goon al interesitoj kaj
 ni mem ĝuos ludi ĝin. (HORI Jasuo)

kodo	titolo	tago	horo	ĉambro
------	--------	------	------	--------

F09 Japana Sekcio de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj

12a (ven) 15:10–16:35 Dom2C

Ĉi tiu kunsido servas por la ĝenerala kunsido de ILEI-JP. Estontaj anoj kaj nuntempaj anoj de ILEI-JP estas bonvenaj. (ISIKAWA Tiekō)

F10 Junuloj

12a (ven) 15:10–16:35 Jam41

Ni kune parolu pri esperanto en Japanio. Kion ni junuloj kaj maljunuloj bezonas por la disvolviĝo de Esperanto? (Miyazaki Gaku)

F11 Pasporta Servo kaj Delegitoj

12a (ven) 15:10–16:35 Jam51

Ni invitas Delegitojn, Gastigantojn de pasporta servo kaj ankaŭ Interesatojn. Ni interŝanĝos informojn pri la spertoj kaj opinioj rilate al "delegita reto" kaj "pasporta servo". (Nisinaga Atusi)

F12 Kantu kun Ĵunko

13a (sab) 13:30–14:55 Dom2C



Ni kune kantu koreajn kaj japanajn kantojn en Esperanto kun profesia kantistino **NODA Ĵunko**.

Estos kantataj *Matenroso*, *Arirang*, *Ĉi tiun vojon*, *Vilaĝa aŭtuno* kaj *La granda kantado*. La ĉeestantojn helpos **TOMIDA Narumi** per klarigo pri la kantoj. (Aikawa Setuko)

F13 Oomoto

13a (sab) 13:30–14:55 Dom12

Ni prezentos lastatempajn aktivadojn de Oomoto kun geknaboj. Krome, oni povas ekscii la rilaton inter Oomoto kaj batalarto "Aikido". (OKUŬAKI Tošiomio)

F14 SAT-kunsido komuna inter koreoj kaj japanoj

13a (sab) 13:30–16:35 Dom2B

Ni diskutos pri politikaj situacioj de Japanio, korea duoninsulo kaj Orienta Azio. Ankaŭ ni diskutos pri agadoj de SAT-membroj kaj ebleco de kunlaboro kun diversaj popolaj organizoj. (Miyazawa Naoto)

F15 Kristanoj

13a (sab) 13:30–14:55 Jam51

Ni kristanoj havos Diservon kaj interkonatiĝos kiel kristanaj esperantistoj. Laikoj estas bonvenaj. (Tadaši Jamada)

F16 La Konstitucio de Koreio

13a (sab) 15:10–16:35 Dom12



Ĉi tiu programo skize eksplikas historion kaj karakteron de korea konstitucio. Ĝi ankaŭ prezentas nuntempajn aferojn rilate al la konstitucio, menciante atentindajn jurisprudencojn. Aktivaj partopreno kaj diskutado estas bonvenigataj. (Suno, Kim Seonwook)


F17 Projekto por KS 35-jara

13a (sab) 15:10–16:35 Jam51

Ni ĉefe diskutos pri kiel ni fruktuzu la premimonon de la premio Deguchi, kiun Komuna Seminario ricevis ĉe UK102 en 2017. (KITAGAWA Hisasi)

F18 Kantu en Esperanto


14a (dim) 09:10–10:35 Dom20



Ni ekzercas nin en tri kantoj. Du estas infanaj kantoj komponitaj de Makino Micuo, *Koropokkuru* kaj *Striga Ludo*. Alia estas *Planedo nomata la Tero*, kiu estas komponita de s-ino Yokoyama Humiko. (Makino Micuo)

F19 Lernu Portretadon de Zamenhof

14a (dim) 09:10–10:35 Dom12



En tiu ĉi fakkunsido oni lernos kiel portreti Zamenhof aŭ iun homan vizaĝfiguron per branĉeta karbo por rapida kaj fort-etosa portret-praktikado. Artpentristo s-ro HO Song instruos pri la proporcio de homa vizaĝo, kiu estas tre grava kaj esenca elemento de desegnado.

La gvidanto donacos ilojn. Portu nur emon provi kuraĝe. (Ho Song)

F20 Esperanto-Universitateto

14a (dim) 09:10–10:35 Jam41

Ni prezentos du budhostatutojn, kiuj situas proksimaj de la kongresejo.

- Budhostatuo Aŝura, la plej populara en Japanio (TAKEMORI Hirotoŝi)
- Granda budhostatuo en Todaĝi-temple (MORIKAWA Kazunori)


F21 Kiel bone funkcias IKEF?

14a (dim) 09:10–10:35 Jam51

Plej grava punkto de la komercado estas "konfido kaj sekureco", kaj la punkto funkcia en Esperantujo ankaŭ estas grava por ne-Esperantistoj kiuj serĉas novan merkaton; "komerca kongruado" varbadas novajn Esperantistojn ... do venu kaj subtenu nian agadon! (Yas KAWAMURA)

F22 utiligu Zubunton en Esperanto (komputilo)

14a (dim) 09:10–10:35 Jam52



linuksa sistemo nomata "Zubunto"(Xubuntu) povas funkcii el usb-memorilo de via komputilo, paralele al vindaĵo kaj mako. ĝi estas senpaga, bone konstruita sistemo. vi povas uzi Esperanton, aŭ la korean, aŭ la japanan, kiel vian bazan lingvon. usb-memorilo estas aĉetebla en la kunsidejo.

(belmonto)


F23 Folkloro Danco

14a (dim) 10:50–12:15 Dom20

Kune lernante diversajn dancojn (valso, tango, chachacha, twist ktp) laŭ kantoj, ni havos specialan prezentadon en Interkona Vespero aŭ speciala programo. Dancamantoj estas bonvenaj. (Li Hyonsuk)

F24 Blinduloj

14a (dim) 10:50–12:15 Dom2A



Japanaj kaj koreaj blindaj esperantistoj diskutos pri diversaj blindulaj aferoj. S-ro TANABE Kunio parolos pri la 84a IKBE (= Internacia Kongreso de

Blindaj Esperantistoj) en julio 2018 en Zagreb, Kroatio. Interesitoj estas bonvenaj. (TANABE Kunio)

kodo	titolo	tago	hor	ĉambro
------	--------	------	-----	--------

F25 Budhano **14a (dim)** **10:50–12:15** **Jam41**

Ni interŝanĝu opiniojn pri budhismo en Japanio kaj Koreio: pri komunaj kaj malsamaj fenomenoj, pri agadoj de Budhana Ligo Esperantista en ambaŭ landoj, k.t.p. Poste ni aŭskultu la belan koruson de la Koro-Sutro komponitan de Lou Harrison, usona komponisto kaj esperantisto.

(Yamaguti Sin'iti)

F26 Prezentu vin en reto je 1 horo per Wix ADI

14a (dim) **10:50–12:15** **Jam51**

La Japana versio de "Wix Artefarita Desegna Inteligenteco:ADI", kiu desegnos belan retejon por vi estis liberigita. Wix ADI lernas pri vi, kaj kreas retejon kombinante diversajn aranĝojn, bildojn, tekstojn, formojn esploritaj el via indiko, kunigante viajn bezonojn.

(Yas KAWAMURA)

F27 Ĝui kaj sperti pri koreaj nutraĵoj **12a (ven)** **15:10–16:35** **Dom2A**



Parolos Elstara, PARK Soohyeon.

En tiu ĉi faka kunsido, koreaj du nutraĵoj estos provprezentitaj, el ili unu estas nomata, **bukumi** 부꾸미, kaj alia estas **akvo-kimĉio** 물김치. Ili estas amataj nutraĵoj en festotagoj de Koreio, do **bukumi** estas fritiĝo kun sorgo faruna (greno), nome, unu de diversaj koreastilaj picoj, kaj **akvo-kimĉio** estas por koreoj kutima manĝaĵo, kiu staras al harmonia nutraĵo konvenante al oleecaĵoj kaj supernutraĵoj populare manĝata en festotagoj kaj aliaj. Ĉifoje kongresanoj povas vidadi iliajn kuiradojn, kaj povas gustumi ilin surloke. Pere de koreaj nutraĵoj momente ni pli altigu kaj dividu reciproke kulturon kiel mondaj civitanoj. Bv. ĝui kaj sperti tiun ĉi interesan fakkunsidon kun amuziĝo.

F28 Festlibro por Ulrich Lins **13a (sab)** **13:30–14:55** **Jam41**

Ĝus eldoniĝis Festlibro omaĝe al la 75-jariĝo de D-ro Ulrich Lins, historiisto, honora membro de UEA kaj longjara amiko de japanaj esperantistoj. Du el la redaktoroj prezentos la libron, kaj ĉeestantoj kune konsideros pri la meritoj de D-ro Lins kaj la signifo de historiaj esploroj pri Esperanto-movado ĝenerale.

(GOTOO Hitosi)

F29 Komuna kunsido de ILEI-JP kaj ILEI-KR

12a (ven) **13:30–14:55** **Dom2E**

Anoj de ambaŭ sekcioj de ILEI, interŝanĝante opiniojn kaj spertojn en eduka agado, celas ontan kunlaboron.

(ISIKAWA Tiekō)

F30 Interkona kunsido pri Hasegawa Teru

12a (ven) **15:00–16:35** **Dom2D**

Ni interkonatiĝu kun civitanaj grupoj por honori Hasegawa Teru. De la 14-a ni havos neoficialan kunsidon kun la membroj de la grupoj.

(FUJII Yumiko)

Salono 1

Dom13: en etaĝo 1 de Kultura Domo

1. Akceptejo de kongreso

Aliĝintoj ricevos la kongreslibron, k.t.p.

Ankaŭ la membrokotizo de JEI kaj aliaj pagoj estas akceptataj.

2. Valizo-deponejo

3. Aliĝejo de la 106-a Japana Esperanto-Kongreso

4. Poŝto-oficejo

funkcias dum 13:00-16:00 (en 12a); 10:00-16:00 (en 13a, 14a)

5. Poŝtmarkoj de kongreso

6. Korea Esperanto-Asocio

7. Irana Esperanto-Asocio

8. Japana Esperanto-Junularo

9. IKEF

Japano Sekcio de Internacia Komerca kaj Ekonomia Federacio kun korea IKEF prezentos.

Salono 2

Dom2S: en etaĝo 2 de Kultura Domo

1. Libroservo

KLEG (Kansaja Ligo de Esperanto-Grupoj) vendas esperantajn librojn kaj aliajn esperantaĵojn.

2. Libroteko Tokio

Prezentado kaj vendo de esperantaj libroj.

3. Skolta Esperanto-Ligo Japano (SEL-JP)

Prezento de siaj agadoj kaj skoltaj libretoj, okaze de la 100a-jara jubileo de Skolta Esperanto-ligo.

4. Nagoja Esperanto-Centro (NEC)

Prezentado de NEC kaj vendo de libroj

5. Japano Budhismo Ligo Esperantista

Prezentado de siaj organoj, k.t.p.

6. Eldonejo HORIZONTO

Eldonejo HORIZONTO estas malgranda, sed eldonas kelkajn librojn ĉiun jaron, ekzemple “Raportoj el Japanio”, “Pacmesaĝoj tra mondo”, “Urboj de sumoistoj tra mondo”, kaj ankaŭ kalendaron.

7. Wakayama Verda Monteto

Prezentado kaj uzo de la cifereca vortaro japana-esperanta de Miyamoto.

8. Esperanto-societo en Numazu

Informo de Esperanto-kurso. Vendo de libroj kaj Esperanto-varoj.

9. Centro de Internacia Informo pri Esperanto

Vendo kaj disdono de libroj nove publikigitaj el Centro de Internacia Informo pri Esperanto, kaj aliaj.

10. Amrilato de SukeraSparo

Vendos varojn pri la komputila ludo "KOTONOHHA Amrilato", kiu uzas Esperanton en la rakonto.

11. NPO Esperanto Jokohama

Ni prezentas nian agadon per niaj organoj kaj broŝuroj, kaj vendas librojn de nia grupo.

12. Salono de *acco*

Prezentado kaj vendo de ceramikaĵoj kun esperantaj desegnaĵoj.

13. SOJO Esperanto-Vegana Kafejo

Prezentado de Esperanta Kalendaro 2019, Magneto-Folioj, Insignoj, Lignaj Tabuletoj, Glumarkoj k.t.p.

14. Ekspozicio de la Artpentraĵ Verkoj de HO Song

sur muroj

Oni povos aprezi ĉarmajn realismajn ole-farbajn verkojn de esperantista artisto Ho Song. Liaj verkoj estis jam ekspoziciitaj en liaj unupersonaj ekspozicioj en diversaj landoj.



15. Libera Esperanto-Asocio en Hokkajdo

Prezentado kaj vendo de esperantaj libroj.

16. Mondo de Esperanto

Prezentado kaj vendo de magazeno "Mondo de Esperanto".

17. Esperanto-servo

Prezentado kaj vendo de Esperanto-varoj.

Tagmanĝo, Bankedo, Frumatena Promenado

Tagmanĝo (12a, 13a, 14a)

Menditan manĝoskatolon ricevu en **Dom2D**, interŝanĝe por la manĝokupono.

Por manĝejoj estas uzeblaj kunsidĉambroj de Kultura Domo, **escepte** de Dom10 "Internacia Halo" kaj Dom20 "Halo". Rekomendindaj estas ĉambroj **Dom2A** kaj **Dom2B** (12-an kaj 14-an), kaj **Dom12** (13-an).

Redonu la ujojn kaj la rubaĵojn al la decidita loko en **Dom2D**.

Bankedo (13a. 18:30 – 20:30)

Bankedejo: **Hotelo Nikko Nara** (日航奈良) (najbare de la stacidomo de la stacio de JR Nara) Ni rekomendas veturi per buso. (Piede vi bezonos pli ol 20 minutojn de la kongresejo.)

Enbusiĝu ĉe la bushaltejo “**Kencho-mae** (県庁前)” (Antaŭ la Gubernia Oficejo, kontraŭa flanko de la antaŭa vojo). Ĉiu buso estas taŭga. Post ĉirkaŭ 10 minutoj elbusiĝu ĉe la haltejo “**JR Nara eki**(JR 奈良駅)” aŭ “**JR Nara eki niŝiguĉi** (JR 奈良駅西口)”.

* Rimarko pri buso -

Estas du tipoj de busoj.

La unuan vi enbusiĝu per la antaŭa pordo, kaj tiam pagu la tarifon (210 enoj).

La duan vi enbusiĝu per la malantaŭa pordo, kaj poste pagu la tarifon ĉe elbusiĝo.



La hotelo troviĝas en la okcidenta flanko de la stacidomo de **stacio JR Nara**. La bankedejo estas en la etaĝo 4.

Bankedejo malfermos sin je la 18-a. Sidiĝu ĉe la tablo laŭ instrukcio de LKK-anoj.

Komence oni servos trinkaĵon por tosti. Oni ne povas mendi pluan trinkaĵon.

Frumatena Promenado (14a. 07:30 – 09:00)

Ni kune promenadu najbare de la kongresejo. Ni vizitos Lageton Sarusawa, Templon Kôhukuzi/Kofukuji, Sudpordegon de Templo Tôdaizi/Todaiji. Dume ni povos renkonti multe da amikemaj cervoj.

Interesitoj kolektiĝu ĉe la fontano (kun bronza statuo de la bonzo, Gyôki/Gyoki) de la stacio *Kintetsu Nara*, je 7:30.


KIEL KUNVIVI KUN BLINDULOJ/VID-HANDIKAPITOJ

Ni, blindaj/vid-handikapitaj esperantistoj partoprenas sen akompananto Esperanto-eventojn. Al ni necesaj helpoj estas nur tre etaj aferoj. Ni esperas ke vi, esperantistoj, helpos nin, dum Esperanto estas la lingvo por realigi la homajn rajtojn de ĉiu de la mondo.




◀ ALPAROLU UNUE DE VI

Alparolu unue de vi al blindulo. (Aŭdinte vian voĉon la blindulo povas ekscii vian ekziston kaj situon.)



◀ POR INSTRUKCII VOJON

Klarigu konkrete, ekzemple: "Iru 50 metrojn rekte kaj vi trovos ĝin en via dekstra flanko." (Ne diru "en tiu direkto". Tio komprenigas nenion.)



◀ POR AKOMPANE GVIDI

Faru ke la blindulo leĝere tenu vian brakon (aŭ ŝultron) per la mano, en kiu la blindulo ne portas la blankan bastonon. Kaj marŝu laŭ la ritmo de la blindulo, sed ne tiru la blindulon.




◀ ĈE ŜTUPARO

Ĉe ŝtuparo voĉe anoncu "Ni iros supren/malsupren." Tio helpas multe.



◀ POR MONTRI SIDLOKON

Faru ke la blindulo tuŝu la dorson de la seĝo. Per tio la blindulo komprenos la situon kaj direkton de la seĝo.



◀ POR SCIIGI SITUOJN DE OBJEKTOJ

Montru la situojn kvazaŭ ili estas sur horloĝo. Ekzemple: "Suko estas je la naŭa horo." (Ne diru: "Tie.")



◀ KIAM VI FORIRAS DE TABLO

Nepre anoncu voĉe: "Pardonon. Mi iros por telefoni." ktp. Se ne, la blindulo alparolus al vi ne-estanta tie.



◀ ĈE BUFEDO


Sidigu blindulon kaj portu manĝon. Aŭ voku kelneron, kiu helpu elekti kaj porti manĝon.

ilustris : SAWA Satiko
projektitis : JABE (= Japana Asocio de Blindaj Esperantistoj)

disdonas : LIBE (= Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj)

● Libere kopii/traduku kaj uzu ĉi tiun flugfolion por la bono de blinduloj.

Por Bona Rilato kun Cervoj



Kvankam cervoj en Nara estas intimaj kun homoj, ili estas bestoj en kampo. Por teni bonan rilaton kun ili kaj ne havi akcidenton, estu zorgema laŭ sekvantaj punktoj.

1. Cervoj estas sovaĝaj bestoj

Ne kolerigu ilin. Ne timigu ilin. Precipe infanoj kaj maljunuloj estu atentemaj por eviti ilian atakon.

2. Ne donu al cervoj manĝaĵon krom vendata platkuko nomatan *ŝika-sembei* (鹿せんべい)

Por ne doni damaĝon al stomako de cervo, ne donu manĝaĵojn, krom "platkuko por cervo", vendata sur stratoj.

3. Kiel doni platkukon al cervoj

Ne donu kukon malrapide, ĉar cervoj atakos vin sen tolero kun kolero. Ili ankaŭ manĝas paperon. Bonvolu kaŝi paperon antaŭ ili. Post nutrado al ili, montrante viajn manojn malfermitajn, rekonigu al ili, ke vi jam ne havas platkukon plu.

Atentu, ke vi ne manĝu tiun kukon. Oni ne produktas ilin por nutri homojn. Antaŭ ĉio ĝi estas malbongusta.

4. Ne forĵetu rubon sur strato nek en parko

Cervoj ofte mortas, manĝinte plastaĵojn. Ili supozas, ke tiuj estas nutraĵoj.

* parte eltirita el la retejo de "Cervo-Humana Societo de Nara"
(一般財団法人奈良の鹿愛護会)

La Espero

poez. L. L. Zamenhof
muz. F. de Ménéil

Movo de marŝo



- 1) En la mon - don ve - nis no - va
- 2) Sub la sank - ta sig - no de l' es -
- 3) Sur neŭ - tra - la lin - gva fun - da -



sen - to, Tra la mon - do i - ras for - ta vo - ko; Per flu -
pe - ro Ko - lek - ti - ĝas pa - caj ba - ta - lan - toj. Kaj ra -
men - to Kom - pre - nan - te u - nu la a - li - an, La po -



gi - loj de fa - ci - la ven - to Nun de lo - ko flu - gu ĝi al
pi - de kres - kas la a - fe - ro Per la - bo - ro de la es - pe -
po - loj fa - ros en kon - sen - to U - nu gran - dan ron - don fa - mi -



lo - ko. Ne al gla - vo san - gon so - i - fan - ta Ĝi la
ran - toj. For - te sta - ras mu - roj de mil - ja - roj In - ter
li - an. Ni - a di - li - gen - ta ko - le - ga - ro En la -



ho - man ti - ras fa - mi - li - on; Al la mond' e - ter - ne mi - li -
la po - po - loj di - vi - di - taj; Sed dis - sal - tos la obs - ti - naj
bo - ro pa - ca ne la - ci - ĝos, Ĝis la be - la son - ĝo de l' ho -



tan - ta Ĝi pro - me - sas sank - tan har - mo - ni - on.
ba - roj Per la sank - ta a - mo dis - ba - ti - taj.
ma - ro Por e -



ter - na ben' e - fek - ti - vi - ĝos.

La Tagiĝo

poez. Antoni Grabowski

muz. Barański

Movo de marŝo



1) A - gor - du la brus - tojn, ho, ni - a fra - tar', Por
2) Post lon - ga mi - gra - do sur dor - na la voj' Mi -
6) En ĉi - u mond-par - to, en ĉi - u ter - zon', En



no - va, pli vi - gla jam kan - to! Ĝi so - nu po - ten - ce de
na - cis nin on - doj de l' ma - ro; Sed ven - kis ni i - lin kaj
ko - roj de cen - toj da mi - loj, Jam vi - bras por ni - a sa -



mon - toj al mar', A - non - cu al ĉi - u dor - man - to. Ta -
ve - las kun ĝoj' Al ver - da ha - ven' de l' ho - ma - ro. Post
lu - to re - son', Do kan - tas de l' te - ro ni fi - loj: Ta -



gi - ĝo, ta - gi - ĝo ra - di - as en rond', La om - broj de l' nok - to for -
lon - ga ba - ta - lo, mal - dol - ĉa tur - ment', La ste - la stan - dar - do jam
gi - ĝo, ta - gi - ĝo ra - di - as en rond', La om - broj de l' nok - to for -



ku - ras el mond'! Ta - gi - ĝo, ta - gi - ĝo ra - di - as en rond', La
flir - tas en vent'. Post lon - ga ba - ta - lo, mal - dol - ĉa tur - ment', La
ku - ras el mond'! Ta - gi - ĝo, ta - gi - ĝo ra - di - as en rond', La



om - broj de l' nok - to for - ku - ras el mond'!
ste - la stan - dar - do jam flir - tas en vent'.
om - broj de l' nok - to for - ku - ras el mond'!

Kiel legi nomon japanan kaj korean

japana skribmaniero

Ekzistas ĉefe 2 manieroj kiel skribi japanan lingvon en latinaj literoj:

- (1) en 1954 estis decidite, kiel transskribi japanan literon en latinan alfabeton, pere de Kabineta Anonco. Ĉi tie ni mencias ĝin "kabineta" sistemo.
- (2) anglesimila "hebon"-a maniero laŭ prononco, kiu originas de la usona misiisto Hepburn(Hebon). ni mencias ĝin "hebona" sistemo.
- (3) alia normo, miksitaj manieroj, aŭ persona ŝanĝo laŭ plaĉo aŭ eraro.

(esperanta) sono	(1) kabineta	(2) hebona	(3) laŭŝata
ŝi	si	shi	
ĉi	ti	chi	
cu	tu	tsu	
hu [ɸu]	hu	fu	
ĝa/ĵa ĝi/ĵi ĝu/ĵu ..	zya zi zyu ..	ja ji ju ..	jya jyi jyu ..
ŝa	sya	sha	
ĉa	tya	cha	
kja	kya	kya	
longa a longa i	â / aa î / ii	a i (sen regulo)	ah, â ĭ
longa u longa e	û / uu ê / ee	u e (sen regulo)	uh, û eh, ĕ
longa o	ô / oo	o (sen regulo)	oh, ou, ō
N (n,m,ŋ) ん	n	n, m	
ekz. naNba	ĉi tiu estas unu silabo. (なんば Na-m-ba: 3 silaboj)		
Q っ (malgranda) ekz. saQporo	ĉi tiu estas unu silabo. duobligu la sekvantan konsonanton. (さっぽろ Sa-p-po-ro: 4 silaboj)		

Atenton: distingo inter longa(~) kaj mallonga vokaloj estas tre grava.

(esperanta) sono	(1) kabineta	(2) hebona	(3) laŭŝata
cuĉija	Tutiya	Tsuchiya	
ziro~	Zirô	Jiro	Jirou, Jiroh
ŝo~ĝi ju~ki	Syôzi Yûki	Shoji Yuki	Shouji
kudo~	Kudô	Kudo	Kudou, Kudoh
o~oka	Ôoka, Oooka	Ooka	Ouoka, Ohoka
ŝiNiĉi	Sin'iti	Shin-ichi, Shin'ichi	Shinichi
saQĉan	Sattyan	Satchan	Sacchan

korea skribmaniero

Ekzistas ĉefe 2 manieroj kiel skribi korean lingvon en latinaj literoj:



- (1) en 2000 estis decidite, kiel transskribi hangulon en latinan alfabeton, pere de Korea Kultura Turisma Buroo. ĉi tie ni mencias ĝin "2000a-jara" sistemo.
- (2) anglesimila maniero laŭ prononco. ni mencias ĝin "angleca" sistemo.
- (3) miksitaj maniero, aŭ laŭ persona ŝanĝo laŭplaĉa.
- (4) atentu. korea lingvo havas 7 vokalojn: a, e, i, o, ɔ, u, ʊ.

esperanta + [IPA]	(1) 2000a-jara	(2) angleca	(3) laŭŝata
pak	Bak	Park	Pak
i	I	Lee	Li, Yi, Ri, Rhi, Rhee
kim	Gim	Kim	
sun	Sun	Soon	
suk	suk	sook	sug
mun	Mun	Moon	
o	O	Oh	
[ɔ]	eo	you	o
ɟɔŋ	yeong	young	yong
seon	seon	sun	son
hɟɔn	hyeon	hyun	hyon
ɟɔŋ	jeong	jung, chung	jong, chong
ĉe	Choe	Choi	Dze
uk	uk	ook, wook	ug
[ʊ]	eu		u
e	ae	ai	e

ekzemploj

esperanta + [IPA]	(1) 2000a-jara	(2) (3) angleca, laŭŝata
hɟɔnde	Hyeondai	Hyundai
i ɟɔŋhɟɔn	I Jeonghyeon	Lee Jung Hyun
pa <u>k</u> munsuk → paŋ munsuk	Bak Munsuk	Park Moonsook * kombino k+m, k+n nepre ŝanĝiĝas al ɟ+m, ɟ+n.
ĉe sun <u>h</u> i → ĉe suni	Choe Sunhui	Choi Soonhee * antaŭvokala h tre ofte malaperas vortomeze en parolo.


Mapo de ĉambroj en Kultura Domo




Mapo de ĉambroj en Kunsidejoj Jamato




etaĝo 2



etaĝo 4




etaĝo 5



Ni havas du kongresejojn

Kultura Domo de Gubernio Nara (ĉefkongresejo)

Kunsidejoj Jamato, ĉirkaŭ 3 minutoj piede de la ĉefkongresejo



Kongreslibro de la 2-a Komuna Esperanto-Kongreso de Japanio kaj Koreio

Eldono: Loka Kongresa Komitato

Kompilo: belmonto (yamasita tosihiro)

Emblemo: YAJIMA (OHMURO) Hiroshi

Eldonejo: Ōtomo Syuppan Insatu, Ōsaka